der esperantist

Mitteilungsblatt des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR

21. Jahrgang Nr. 130 (2/1985) ISSN 001 4-0619 30 Pf

Prof. D-ro Georg Friedrich Meier

Pri la bezono de Esperanto

Sojle de la 20a al 21a jarcento montriĝas gravaj ŝanĝoj en la internacia komunikado. Pli kaj pli da naciaj lingvoj kaj skribaj lingvoj ricevas apartan subtenon aŭ almenaŭ certan gradon de aŭtonoma uzo. Pli kaj pli da publicajoj kaj disaŭdigoj en amaskomunikiloj realiĝas en la novaj skribaj lingvoj. Kun la plua progreso de pluraj evolulandoj ankaŭ en tiuj landoj produktatas informoj tradukendaj por utiligi ilin por la informricevado. Aliflanke ni spertas teruran urbaniĝon: la grandaj urboj kaj centroj de densa loĝateco postulas trafiklingvon por la ofte sufiĉe heterogena amaso da almigrintoj. Parte ekestas novaj urbaj slangoj kaj pidĝinaj lingvoj tie, kie sen ili la granda nombro de etnaj kaj lingvaj diferencoj malebligus komunikadon. En la grandaj multpopoloj ŝtatoj — la plej multaj ŝtatoj estas lingve ege heterogenaj — formiĝas „linguae francae" aŭ ŝtataj lingvoj, kiuj ne estas identaj kun la gepatraj lingvoj. La scienco fariĝas decida produktiva forto kaj daŭre liveras pli da novaj informoj. La altiĝanta nivelo de aŭtomatigo postulas ĉiam novajn kaj rapidajn teknikajn evoluojn, ĉiam pli altiĝantan procentan parton da science edukitaj produktantoj kaj rapidan informadon. Tradukoj el la multnombraj lingvoj aŭ en tiujn lingvojn sur la kampo de politika kaj ekonomia informado, tradukoj el la lingvoj uzataj en la scienco kaj en tiujn bezonas multe da tempo kaj kreskantan nombron de tradukistoj aŭ traduk-aŭtomatoj. Aliflanke pli kaj pli da sciencaj branĉoj klopodas krei propran sciencan lingvon. Oni povus rigardi tiun lingvan prognozon kriza situacio se ne ekzistus kiel sola prudenta solvo la interkonsento pri facile lernebla kaj facile aŭtomate prilaborebla lingvo. Konsiderante la parte sufiĉe komplikajn lingvajn strukturojn de la plej gravaj mondlingvoj por tio sin fakte proponas nur planlingvo. Nur unusola el la diversaj proponoj — Esperanto — hodiaŭ akiris aprobon, eĉ se ne en la senco de la menciita problemsolvo. Ripročoj kaj antaŭjuĝoj kontraŭ planlingvoj hodiaŭ ne plu restas sen kritiko. La tre fleksebla vortfarado de Esperanto ebligas altan gradon de produktiva formado de neologismoj, tiel ke eblas formi ĉiun fakan terminologion, kiu ja grandparte konsistas el internaciismoj. Kiel gravajn paŝojn pro tio oni devas rigardi kaj la kontinuan esploron de Esperanto (Esperantologio) en la kadro de interlingvistika esplorado kaj la sukcesivan instruon en altlernejaj, vesperaj kursoj, por scienculoj, por laborantoj en la produktado kaj en aliaj klerigaj institucioj. Al la plej gravaj argumentoj por internacia planlingvo apartenas ĝia relative malgranda didakta peno, tiel, ke oni tre frue plenefike kapablas traduki kaj baldaŭ ankaŭ paroli.
Ligita kun tio estas ankaŭ psikologia-pedagogia faktoro en la senco de frutempa sperto de sukceso, kiu samtempe povas doni impulsojn por la lernado de aliaj lingvoj. (El la antaŭparolo en: D. Blanke „Esperanto und Wissenschaft", Berlin 1982, p. 5 — 6).

Trad. Linde Knöschke

El la „Proverbaro de Esperanto“

de d-ro L. L. Zamenhof

Afabla vorto pli atingas ol forto. Agrabla estas gasto, se ne longe li restas. Al ĉevalo donacita oni buŝon ne esploras. Al ĉiu besto plaĉas sia nesto. Al hundo bastono, al hom'-leciono. Aliaj domoj, aliaj homoj. Al fiŝo ne instruu naĝarton. Antaŭ tima okulo potenciĝas eĉ kulo. Antaŭ vespero ne estu fiera. Avarulo kaj porko estas bonaj post morto. Bezono estas plej forta ordono. Blindulo kartojn ludi ne provu. Bruo potenca, nula esenco. Ĉe botisto la ŝuo estas ĉiam kun truo. Ĉe tablo malplena babilo ne fluas. Ĉe vulpoj ĉiam naskiĝas nur vulpoj. Ĉiu medalo du flankojn posedas. Dancu diabloj, sed ne en mia arbaro. Per plendoj kaj ploro ne foriras doloro. De semo putra venos frukto nenutra. De unu bovo oni du felojn ne ŝiras. Diron oni neas, skribo ne pereas. Doni ovon por ricevi bovon. Donu fingron al avidulo, li tutan manon postulas. Du botoj faras paron. Du militas, tria profitas. Dum la manĝado venas apetito. Ebrieco pasas post dormo, malsaĝeco neniam. Eĉ bagatelo povas servi al celo. Eĉ en Parizo herbo ne fariĝas cerbo. Eĉ inter piuloj ne mankas pekuloj. Mizero instruas. Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan. Eĉ monstron admiras, kiu ame deliras. En landoj transmaraj estas oraj arbaroj. — En mizero eĉ saĝulo estas malsaĝa. En sia dometo li estas atleto. Espero panon ne donas. En unu sako du katoj, ĉiam mordoj kaj gratoj. Estas ŝafo estos lano. Estu ĉapo laŭ kapo. Facile estas danci, se la feliĉo kantas. Falinton ĉiu atakas.

Farita-elstrekita. Fianĉiĝo ne estas edziĝo. Fiera mieno-kapo malplena. Fleksu la arbon dum ĝia juneco. Gardu kandelon por la nokto. Geamantoj sin pikas. Granda kranio, sed interne nenio. Granda nubo-eta pluvo. Fordoni anseron, por ricevi paseron. Hazardo. estas malbona gardo. Homo senpeka neniam ekzistis. Hundo bojas homo vojas. Inter faro kaj rakonto staras meze granda monto. Inter generaloj parolu pri bataloj.Interkonsento estas pli bona ol mono. Inter blinduloj reĝas la strabulo. Inter pokalo kaj lipoj povas multe okazi. Iras ĉiu kruro laŭ sia plezuro. Iri for en bona hor'. Jen staras la bovoj antaŭ la monto. Ju cerbo pli prudenta, des lango pli silenta. Ju pli da bruo, des malpli da ĝuo. Kaldrono ridas pri poto kaj mem estas kota. Kapo majesta, sed cerbo modesta. Kaprica fianĉino restos eterne fraŭlino. Kapuĉo monahon ne faras. Karakteron al kanto donas la tono. Kelktempa ĉeso ne estas forgeso. Kiam kato jam formanĝis, forpelado ne helpos. Kiam nokto vualas, ĉiuj koloroj egalas. Kia oni vin vidas, tia oni vin taksas. Kia patrino, tia filino. Kie ajn rano iras, ĝi ĉiam marĉon sopiras. Kie dento doloras, tien iras la lango. Kie diablo ne povas, tien virinon li ŝovas. Kie estas mielo, tie muŝoj ne mankas. Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas. Kien kudrilo iras, tien fadenon ĝi tiras. Kie timo, tie honto. Kiom da homoj tiom da gustoj. Kion rajtas leono, ne rajtas azeno. Kion saĝulo ne komprenas, ofte malsaĝulo divenas. Kion vi semas, tion vi rikoltos. Kiu aŭdis unuan, ankaŭ aŭdu la duan. Kiu batas edzinon, tiu vundas sin mem. Kiu flatas al ĉiu, plaĉas al neniu. Kiu glutis tro multe, tiu agas tro stulte. Kiu havas abelojn, havas mielon. Kiu komencis kuiri, ne forkuru de l' fajro. Kiu levis la piedon, devas ekpaŝi. Kiu mensogis per unu vorto, ne trovos kredon ĝis la morto. Kiu nenion valoras, plej multe sin gloras. Kiu ne riskas, tiu ne gajnas. Kiu pekis, tiu pagas. Kiu perdis la kapon, ne bezonas jam ĉapon. Kiu rigardas ĉielon, maltrafas sian celon. Kiu rompis la glason, ordigu la kason. Kiu servas al ĉiu, al si mem malutilas. Kiu sin enjungis, devas tiri. Klopodi pri ĉies favoro estas plej malsaĝa laboro. Kolero montras malsaĝulon. Komenci per flato kaj fini per bato. Koniĝas birdo laŭ flugo kaj homo laŭ ago. Kontraŭ neesto ne helpas protesto. Kun kiu vi festas, tia vi estas. Kun kiu vi kuniĝas, tia vi fariĝas. La afero ne staras sur pinto de ponto. Laboro fi-

nita ripozo merita. La lango de virino estas ŝia glavo. Lango nenion atingas, se ĝin saĝon ne svingas. Laŭdu la maron, sed restu sur tero. Ligno fendita facile flamiĝas. Longe ŝtelos ŝtelisto, tamen fine li pendos. Lupo dormanta ŝafon ne kaptas. Malbona virino diablon superas. Malgranda estas la flamo, tamen ne mankas la fumo. Malsata stomako orelon ne havas. Melku virbovon senfine, li lakton ne donos. Mensogo kaj ŝtelo estas du fratoj. Monto gravediĝas, muso naskiĝas. Neceseco kontraŭvola estas leĝo malmola. Ne kaptita, ne punita. Ne kotas besto en sia nesto. Ne kredu al parolo sen propra kontrolo. Ne kvanto sed kvalito decidas pri merito. Nenia konstruo povas esti sen bruo. Neniu estas profeto en sia urbeto. Ne povas esti ĉiu homo papo en Romo. Ne ŝovu nazon en fremdan vazon. Ne valoras bofilo, kiam mortis filino. Nigran kornikon sapo ne blankigas. Nokte eĉ monstro estas belulo. Nuda kaj kruda sen groŝo en poŝo. Okazo kreas ŝteliston. Ordo estas beno por ĉiu entrepreno. Ordonita kiso havas guston maldolĉan. Ovo kokinon ne instruas. Paroloj kaj faroj estas malsamaj aferoj. Per unu ŝtono oni du ĵetojn ne faras. Per vorto ĝentila ĉio estas facila. Plej bona spirito estas silento. Plej danĝera malsano estas manko de saĝo. Pli bona brancxo sennuksa ol kaĝo plej luksa. Pli bona estas gajno malgranda ol granda malgajno. Pli bona estas saĝa malamiko ol malsaĝa amiko. Pli bona homo sen mono ol mono sen homo. Pli bona pano sen butero ol kuko sen libero. Pli bona pura konscienco ol malpura potenco. Pli kara estas kapo ol ĉapo. Por ĉiu ago venas tempo de pago. Por ĉiu plezuro devas esti mezuro. Por ebriulo ne ekzistas danĝero. Por hundon dronigi oni nomas ĝin rabia. Por malfrua gasto restas nur osto. Por muŝon mortigi oni batilegon ne uzas. Por unu festeno, por alia ĉagreno. Post batalo preĝo ne helpas. Post la fino de l' batalo estas multaj kuraĝuloj. Pri gustoj oni disputi ne devas. Pri la ŝtrumpa truo scias nur la ŝuo. Propra sufero plej granda sur tero. Putrado de fiŝo komenciĝas de l' kapo. Rado malbona knaras plej multe. Rajdi sur ĉevalo oni ne lernas sen falo. Rano eĉ en palaco sopiras pri marĉo. Razisto raziston razas. Resti maljuna knabino. Restu tajloro ĉe via laboro. Riĉulo havas grandan parencaron. Riĉulo havas kornojn, malriĉulo dornojn. — Ridas blindulo pri lamulo. Rido matene ploro vespere. Saltadi ĉirkaŭ afero, kiel blovata neĝero. Sango bolas, juneco petolas. Se la kaliko tro pleniĝas, la vino elverŝiĝas. — Selante ĉevalon, oni ĝin karesas. Se mi scius, kie mi falos, mi tien metus tapiŝon. Se mi scius, kion mi ne scias, ĉiuj saĝuloj min envius. Se ne estus „se" kaj „tamen", mi al ĉio dirus amen. Malsaĝo estas najbaro de mizero. Senfara plendo ne estas defendo. Sen gutoj malgrandaj maro ne ekzistus. Senpaga estas nur la morto, sed ĝi kostas la vivon. Sen povo kolero estas ridinda afero. Sen regalo ne estas balo. Sidi en amaso de embaraso. Sklavo kun forta mano estas plej granda tirano. Stomako ne stas spegulo: kion ĝi manĝis, ne vidas okulo. Sur ĉiu flanko nur manko kaj manko. Ŝipon rompitan ĉiuj ventoj atakas. Tablon ornamas ne tuko sed kuko. Tempo kaj cirkonstancoj saĝon alportas. Timo havas grandajn okulojn. Tolaĵon malpuran lavu en la domo. Trafis pugno pugnon. Troa festeno estas veneno. Tro akra fajro estas sen daŭro. Tro elektema ricevas nenion. Unu du, tri, kvar, kaj finita la far'! Unu soldato militon ne faras. Venas proverbo el popola cerbo. Vespere ĝuu lunon, sed ne serĉu sunon. Vespero lacigas, mateno freŝigas. Virina lango buĉas sen sango. Virina rideto pli kaptas ol reto.

Vivi sate kaj glate. Vivu, progresu sed lerni ne ĉesu! Vizaĝo agrabla sed ungo diabla. Vizaĝo sen kulpo sed koro de vulpo. Volo kaj sento faras pli ol prudento. Vortojn ŝparu, agojn faru. Vortoj sakon ne plenigas. Vulpo mienon ŝanĝas, sed plue kokidojn manĝas. Zorgu vivon vian kaj lasu vivi alian. Longe ĉerpas la kruĉo, ĝis fine ĝi rompiĝas. Matena horo estas plena de oro. Ne falas frukto malproksime de l'arbo. Nur tiu ne eraras, kiu neniam ion faras. Oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulon per lia

Hungara Esperanto-Asocio:

La plej aktiva libroeldonejo en Esperantujo

La eldona agado de HEA komenciĝis en 1976 kaj rezultigis ĝis nun ĉ. okdek esperantajn librojn kun suma eldonkvanto de pli ol 250 mil ekzempleroj. Tiuj ciferoj **ne** inkluzivas vortarojn kaj lernolibrojn!

La agado startis kun represoj. Tio okazis pro du kialoj: unu praktika kaj unu principa. La praktika kialo estis, ke represoj postulis malpli da laboro, do la ankoraŭ senspertaj aktivuloj pli facile solvis tiun taskon. La principa kialo estis havigi al la esperantistoj almenaŭ kelkajn el la klasikaj verkoj de la esperanta literaturo. Tiel aperis inter alie la esearo **De paĝo al paĝo** de L. Tàrkony kaj la poemaro **Kvaropo** de Auld-Dinwoodie-Francis-Rossetti. Tiu ĉi lasta verko aperis en 2 000 ekzempleroj, kaj dum ne tre longa tempo ĝi elĉerpiĝis. La unua eldono ĉe ŝtafeto aperis nur en 1 000 ekzempleroj. Pluaj klasikaj verkoj, kiuj estis reeldonitaj: El la **„Verda Biblio"** de I. Lejzerowicz, satiro esperantista krimkomedio de F. V. Dorno, **Enciklopedio de Esperanto** ktp.

Tiuj ĉi represoj nepre kontribuis al la kultura homogenigo de la esperantista komunumo. La saman celon deziris servi ankaŭ tiaj eldonaĵoj, kiel **Gvidlibro por supera ekzameno**, kiu relative amplekse pritraktas la historion de la esperanto-movado kaj de la esperanta literaturo; **Baza literatura krestomatio,** kiu donas per specimenoj superrigardon pri la tuta esperanta literaturo; **Socipolitikaj aspektoj de la esperanto-movado,** kiu analizas mem la esperantistan komunumon. **25 jaroj,** antologio redaktita kun premiitaj verkoj de Belartaj Konkursoj, celis prezenti la esperantan literaturon inter 1951 — 1975.

Grandaj fortostreĉoj

La plej grandaj financaj fortstreĉoj de nia eldona agado estis la tri plej ampleksaj verkoj: **Enciklopedio de Esperanto** / 600 p. / **Tutmonda Sonoro** / en du volumoj 664 p. / kaj **Hungara Antologio** / 447 p. / Sed la rezulto valoris la penon: **Enciklopedio de Esperanto** / 2 000 ekz. / disvendiĝis dum du jaroj, el **Tutmonda Sonoro** / aperinta en 2 500-ekz. / restas nur malpli ol 500 ekzempleroj, kaj el la 2 000-ekzemplera eldonkvanto de **Hungara Antologio** dum dek monatoj vendiĝis preskaŭ la duono. La supraj libroj estas kompreneble multekostaj, do la vendrezultojn oni povas trovi vere imponaj, precipe tiun de **Tutmonda Sonoro**, ja onidire la publiko „ne bezonas poemarojn".

Originala beletro

Fidela al la tradicioj de „Literatura Mondo", Hungara Esperanto-Asocio

[daŭrigo p. 29]

---

rido. Pri tio jam ĉiuj paseroj babilas. Prokrastita ne estas perdita. Propran ĝibon neniu vidas. Sidi kiel sur pingloj. Ŝtelisto ŝteliston ne perfidas. Unu ovo malbona tutan manĝon difektas. Venis fino de mia latino. Koko krias fiere sed ne danĝere. Komparo ne estas pruvo.

Dr. sc. phil. por Blanke

La 13-an de februaro 1985 en Humboldt-Universitato Berlin (GDR) d-ro Detlev Blanke defendis sian duan disertacion kaj akiris la gradon de „doktoro de sciencoj" por la fako interlingvistiko. Detalojn vidu en „der esperantist" 3/1985.

ĉiam donis apartan atenton al la flegado de la originala esperanta beletro. Dum la lastaj jaroj aperis jam ne unuavice represoj, sed novaj, valoraj beletraĵoj. La novelaro **Lappar, la Antikristo** de Endre Tòth eĉ gajnis la titolon „La libro de la jaro 1982". Kun granda elano startis la hungara esperantista prozisto Istvàn Nemere: dum la lastaj dudek monatoj aperis unu novelaro kaj kvar romanoj de li. Lia kvina romano — **La Monto** — estas presata, kaj komence de la venona jaro aperos pluaj romanoj de li.

HEA volas certigi eblecon unuavice al la hungaraj esperantistaj aŭtoroj, tamen lastatempe ĝi eldonis la novelaron **Iluzioj** de Lorjak / franco / kaj la dokumentan dramon **Ni vivos!** de Julian Modest / bulgaro /. Ĝis somero aperos po unu plia verko de ili: la humura krimromano **Eùlalia** de Lorjak, kaj la nostalgie lirika romaneto **La ora Pozidono** de Julian Modest.

Apud la senduba prioritato de originalaĵoj aperis abunde ankaŭ tradukitaj verkoj, ĉefe el la hungara literaturo, tamen ankaŭ tradukaĵoj el aliaj lingvoj. Jen, kelkaj el ili: **Hundbazaro,** kolekto de 33 ravaj kaj bonege tradukitaj porinfanaj poemoj, du romanoj de Frigyes Karithy / **Vojaĝo al Faremido** kaj **Kapilario** / la korprema longa rakonto **Malriĉaj homoj** de Zsigmond Mòricz, kaj la klasika junulara romano **La knaboj de Paùlo-strato** de la tutmonde konata hungara verkisto Ferenc Molnàr. El aliaj literaturoj aperis la sovetia junulara romano **Timur kaj lia Taĉmento** de A. Gajdar kaj la bulgara romano **Vilaĝo Borovo** de K. Velkov.

Libroj por progresantoj

Ni rimarkis, ke estas granda bezono por libroj, kiujn povas eklegi ankaŭ esperantistoj, ĵus finintaj la elementan kurson. Tiuj homoj estas la estontaj legantoj de nia altnivela beletro, sed ili bezonas helpon pon atingi la necesan lingvan kompetentecon. Por tiu vasta tavolo de esperantistoj estis eldonitaj la tre belaspektaj bildstriaj adaptaĵoj de pluraj klasikaj romanoj: **La filoj de'l ŝtonkora homo** de M. Jòkaj, **Steloj de Eger** de G. Gerdonyi, La **Faraono** de B. Prus, **La aventuroj de Tom Sawyer** kaj **La aventuroj de Huckleberry Finn** de M. Twain.. Tiujn esperantistojn servas la represo de la ĉarma eksmoda sed didaktike brila romaneto **La Verda Koro** de Julio Baghy, la prilingvaj artikoloj **Marĝene de la lernolibro** de Bernard Golden, la represo de **Amuzaj dialogoj** de A. Lienhardt kaj la ĵusa eldono de la elstara libro de la sama aŭtoro: **Amuza legolibro en Esperanto,** kiu enhavas cent amuzajn historiojn, kun 2 000 didaktikaj demandoj kaj respondoj. La lingvan perfektiĝadan servas la reeldono de la fama praktika gramatika libro de H. Seppik: **La tuta Esperanto,** kiel ankaŭ **Gramatika demandaro resuma** de Julio Baghy.

Fakaj libroj

Dum la lasta tempo startis ankaŭ signifa faka eldona agado en Hungario, eĉ ekster la kadroj de HEA. Aperis en ses volumoj sur 1 126 paĝoj entute 90 prelegoj de komputista simpozio, okazinta fine de 1982 en Budapeŝto. Preskaŭ en ĉiu jaro aperis kaj daŭre aperas 80 — 100 paĝaj kajeroj sub titolo **Sciencaj Komunikaĵoj.**

La bazoj de daŭra vasta agado estas je dispono, tamen estas necese, ke la esperantistoj estu pli bone informitaj pri niaj libroj, ja nur informiteco povas naski aĉetemon.

La libroj estas mendeblaj ĉe Haus der Ungarischen Kultur 1020 Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9 V. Benczik

Materialoj serĉataj

La 9an de majo 1985 sovetia popolo festas la 40an datrevenon de la venko super faŝismo. Kazenja E-klubo organizas ekspozicion dediĉitan al la granda evento. Do ni petas E-klubojn kaj esperantistojn de diversaj landoj sendi al ni fotojn, bildkartojn, insignojn, markojn, eltranĉaĵojn kaj aliajn materialojn, kiuj montras lukton de antifaŝistoj dum la dua mondmilito kaj ankaŭ liberigitan mision de sovetia armeo (1944 — 1945).
Nia adreso: E-klubo, Dekabristov, 1, Kazanj, SU — 420123, Sovetunio.

La ĝisnunaj Universalaj Kongresoj de Esperanto

S-ro Klaff el Leipzig demandas, kiam kaj kie ĝis nun okazis la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj kun kiom da partoprenintoj. Jen nia respondo (laŭ jarlibro de UEA 1984).

N-ro	Jaro	Loko	aliĝintoj
1-a	1905	Boulogne-sur-Mer, Francio	688
2-a	1906	Genève, Svislando	1200
3-a	1907	Cambridge, Britio	1317
4-a	1908	Dresden, Germanio	1500
5-a	1909	Barcelona, Hispanio	1500
6-a	1910	Washington, Usono	357
7-a	1911	Antwerpen, Belgio	1800
8-a	1912	Kraków, Pollando	1000
9-a	1913	Bern, Svislando	1203
10-a	1914	Paris (ne okazis) aliĝis	3739
11-a	1915	San Francisco, Usono	163
12-a	1920	Den Haag, Nederlando	408
13-a	1921	Praha, Ĉeĥoslovakio	2561
14-a	1922	Helsinki, Finnlando	850
15-a	1923	Nürnberg, Germanio	4963
16-a	1924	Wien, Aŭstrio	3400
17-a	1925	Genève, Svislando	953
18-a	1926	Edinburgh, Skotlando	960
19-a	1927	Danzig	905
20-a	1928	Antwerpen, Belgio	1494
21-a	1929	Budapest, Hungario	1200
22-a	1930	Oxford, Britio	1211
23-a	1931	Kraków, Pollando	900
24-a	1932	Paris, Francio	1650
25-a	1933	Köln, Germanio	950
26-a	1934	Stockholm, Svedio	2042
27-a	1935	Roma, Italio	1442
28-a	1936	Wien, Aŭstrio	854
29-a	1937	Warszawa, Pollando	1120
30-a	1938	London, Britio	1602
31-a	1939	Bern, Svislando	765
32-a	1947	Bern, Svislando	1370
33-a	1948	Malmö, Svedio	1761
34-a	1949	Bournemouth, Britio	1534
35-a	1950	Paris, Francio	2325
36-a	1951	München, FR Germanio	2040
37-a	1952	Oslo, Norvegio	1614
38-a	1953	Zagreb, Jugoslavio	1760
39-a	1954	Haarlem, Nederwlando	2353
40-a	1955	Bologna, Italio	1687
41-a	1956	Kobenhavn, Danlando,	2200
42-a	1957	Marseille, Francio	1468
43-a	1958	Mainz, FR Germanio	2021
44-a	1959	Warszawa, Pollando	3256
45-a	1960	Bruselo, Belgio	1930
46-a	1961	Harrogate, Britio	1646
47-a	1962	Kobenhavn, Danlando	1550
48-a	1963	Sofia, Bulgario	3472
49-a	1964	Den Haag, Nederlando	2512
50-a	1965	Tókyó, Japanio	1710
51-a	1966	Budapest, Hungario	3975
52-a	1967	(Tel-Aviv, Israelo) — Rotterdam, Nederlando	1265
53-a	1968	Madrid, Hispanio	1769
54-a	1969	Helsinki, Finnlando	1857
55-a	1970	Wien, Aŭstrio	1987
56-a	1971	London, Britio	2071
57-a	1972	Portland (Oregon), Usono	923
58-a	1973	Beograd, Jugoslavio	1638
59-a	1974	Hamburg, FR Germanio	1651
60-a	1975	Kobenhavn, Danlando	1227
61-a	1976	Athinai, Gerklando	1266
62-a	1977	Reykjavik, Islando	1199
63-a	1978	Varna, Bulgario	4414
64-a	1979	Luzern, Svislando	1635
65-a	1980	Stockholm, Svedio	1800
66-a	1981	Brasilia, Brazilo	1749
67-a	1982	Antwerpen, Belgio	1899
68-a	1983	Budapest, Hnugario	4834
69-a	1984	Vancouver, Kanado	802
70-a	1985	Augsburg, FR Germanio	
71-a	1986	Peking, Ĉinio	

Helpu doktoriĝi!

Mi preparas disertacion „Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945", bezonas ajnajn interlingvistikajn periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn k. informojn pri ili. Rekompenco laŭ interkonsento: Aleksandro Melnikov, a. ja. 393, 344 007 Rostov-Don. Dankon.

Serĉataj: Konversaciaj vortaroj

Por kompilado de Vortaro de Esperanto mi bezonas frazeologiajn, konversaciajn kaj tradukajn vortarojn de Esperanto: francajn, italajn, hispanajn, portugalajn, grekajn, germanajn, anglajn kaj aliajn. Kompenso per libroj eldonitaj en USSR aŭ laŭdezire. Karvacki Aleksandr, p. k. 287, 620145 Sverdlovsk — 145 USSR.

(Redaktas: Dieter Berndt, 1020 Berlin, Berolinastr. 2)

Dubindaj rekordoj

Ĉiu sportisto strebas atingi kiel eble plej bonajn rezultojn en sia sportobranĉo. Tiam oni parolas pri rekordoj. Sed ekzistas ne nur rekordoj de sportistoj. En okcidentaj gazetoj oni povas ofte legi pri la plej diversaj rekordoj, kiuj havas nenion komunan kun sporto.

Ekzistas eĉ libro nomata „Guinnes. La libro de rekordoj". En ĝi oni registras ĉiujn eblajn kaj neeblajn rekordojn, kaj al ili certe ne minacas senlaboreco. Ekzemple: la danino (Dänin) Helga Jensen rulis per la nazo avelon (Haselnuß) preskaŭ du kilometrojn. La sviso Toni Wild sidis sur arbo 120 horojn kaj 15 minutojn kaj nutris sin nur per pomoj. La franco Francios Mercier dancis seninterrompe (ununterbrochen) 97 horojn, 14 minutojn kaj 19 sekundojn. Kun la rezulto 204 : 194 finiĝis la plej longdaŭra futbala ludo en la mondo. La futbalistoj estis 42 horojn sur la ludejo.

Spektantoj el ĉiuj anguloj de la mondo venas ol Evry apud Parizo por ĉeesti la „Olimpiadon de absurdajoj". Kion oni tie povas vidi: ekzemple la plej fortan viron de la mondo, kiu per siaj dentoj tenas motociklon; iun barbiron el Parizo, kiu razas la homojn per la piedoj kaj multajn aliajn.

En la usona (USA) ŝtato Florida, oficisto de iu muzeo dum ok horoj bonvenigis 8614 vizitantojn per manpremo (Händedruck). Tio estis nova monda rekordo. Li superis la longjaran rekordon de la iama usona prezidento Roosevelt, kiu en la jaro 1907 bonvenigis tiamaniere 8513 gastojn en la Blanka Domo. Kaj la reago de la usona gazetaro (Presse): „Simpla oficisto superis la usonan prezidenton!

Certe oni povus mencii ankoraŭ multajn aliajn „rekordojn". Tamen la rekordoj, kiujn atingas veraj sportistoj dum la Olimpiaj ludoj aŭ dum mondaj ĉampionadoj estas pli valoraj ol tiuj artifikaĵoj. Tiuj „rekorduloj" distancas sin mem de ĉiu ajn sporto kaj oni povas dubi ĉu temas pri normalaj sanaj homoj.

(Laŭ: „Sport in der Sowjetunion")

Tasko

— Ankaŭ ni volas hodiaŭ serĉi inter vi „rekordulon". Vi bezonas nur paperon, skribilon kaj konon de Esperantaj vortoj. Via tasko estas fari vortĉenon laŭ jena maniero: ŝanĝu donitan vorton al alia, sed vi rajtas ŝanĝi ĉiam nur unu literon. Ekzemple: varo, paro, maro, malo ktp. Kondiĉoj: ne ŝanĝu la finaĵon kaj ĉiu vorto povas aperi en la ĉeno nur unufoje. Kompreneble devas aperi nur normalaj vortoj kaj ne iuj elpensaĵoj. La komenca vorto estas „parko". Kaj nun ek al la laboro. Kaj vi scias certe jam, ke ĝis du monatoj post la apero de tiu ĉi numero devas esti viaj vortĉenoj ĉe mi.

Dieter Berndt

Pasivebleco de verboj

La Esperantisto, 1890, p. 32. L. L. Zamenhof: La esprimo „estu timata" estas uzita tute bone kaj regule. En la rusa lingvo la vorto „timi" ne havas pasivon, sed tio ĉi ne montras ankoraŭ, ke ankaŭ en Esperanto ĝi ne devas havi pasivon. En ĉiu vivanta lingvo estas permesita uzi nur tiujn formojn, kiujn aliaj personoj jam uzis antaŭ vi, sed en la lingvo internacia oni devas obei sole nur la logikon. La logiko diras, ke ĉia verbo p o v a s havi pasivon, se nur la senco ĝin permesas. Sed en la verbo „timi" la senco tute bone permesas pasivon, kiel en aliaj verboj. Ĉe la timado ni havas ĉiam du personojn aŭ objektojn: unu, kiu timas, kaj unu, kiun oni timas, aŭ kiu estas timata. „De l'malamikoj vi estu timata" signifas: ke la malamikoj timu vin/ = je vi aŭ antaŭ vi/. Vere, ke en la rusa lingvo oni diras ne „timi lin", sed „timi de li"; sed tio ĉi estas aparteco de la rusa lingvo, kiu tute ne estas deviga ankaŭ por ĉia alia lingvo. Jam la senco mem permesas tute bone uzi la verbon „timi" kun la akuzativo/ en tia maniero ĝi ankaŭ estas uzata en multaj lingvoj, kie ĝi tiel ankaŭ havas pasivon/; sed se la senco ĝin ankaŭ ne dirus, ĝin diras ja tute klare nia gramatiko, laŭ kiu en ĉia duba okazo oni povas uzi la prepozicion „je" aŭ la akuzativon sen prepozicio. Eĉ de vortoj, kiuj per si mem ne postulas la akuzativon, vi povas en nia lingvo libere ĉiam fari pasivon, se nur la senco de tiu ĉi pasivo estos komprenebla. Tiel ekzemple en la versaĵo „Al la Esperantisto" estas ne malregule uzita la esprimo „la celo estos alvenita" /„oni alvenos al la celo/.

Ĉarmaĵoj por la aŭto

Estas konate, ke tiu, kiu ŝatas sian aŭton, purigas ĝin ĉiudimanĉe sindoneme kaj dum multe da horoj. Cetere oni povas esprimi sian grandan simpation al la fiera veturilo ankoraŭ alie: Oni ornamas ĝin per strangaj glumarkoj (ekz. „Prenzlauer Berg" — prenclaŭa monto — salutas la reston de la mondo) aŭ per verdaj ranoj . . .

Krome eblas almeti allogajn flagrubandojn, plej bone ĉe la malantaŭa fenestro, kio limigas la vidadon al la postveturantoj, sed tio ne estas grava.

Kaj oni ne forgesu almenaŭ ĉe la retrospegulo aŭ ĉe la aliaj lokoj pendigi ŝercaĵojn ekz. skeleton malgrandan kaj blankan; ankaŭ sorĉistino de „Brocken" estas tre ĉarma. Futbala boteto malkaŝas la hobion. Pri la personeco de la aŭto-posedanto oni ricevas informon, kiam li balancas remburitan minibikinon sur pupoarko antaŭ sia nazo.

Lasta varianto: En bonaj vendejoj pri artaĵoj oni povas akiri plenmamajn dratfraŭlinojn kun blondaj tufoj, kiuj pro siaj ekscite longaj kokete krucigitaj kruroj precipe taŭgas esti metitaj al ĉapelkrado. Do, nur ideoj estas necesaj, kaj el bezonaĵo (aŭto) fariĝas ornamaĵo, ne laste por la plezuro de la dekstre, maldekstre kaj malantaŭe veturantaj gapuloj.

Kvazaŭ malgranda komplezo laŭ § 1 STVO (regularo pri strata trafiko).

Tradukita el „Der Morgen" de Oskar Stolberg

Buch über Plansprachen im Akademie-Verlag 1985

Im Verlagsprogramm 1985 des Akademie-Verlages Berlin liest man auf S. 44/45 folgende Information:

Detlev Blanke

Plansprachen in Theorie und Praxis

Eine Einführung. (Sammlung Akademie-Verlag, Sprache.) 1985.

Etwa 350 Seiten, 14,5 x 21,5 cm, etwa 25,— Mark

Bestell-Nr. 753564 3 Bestellwort: Blanke, Plansprachen 7534

Von Menschen bewußt geschaffene Sprachen wie Esperanto, Ido, Interlingua u. a. werden nach ihrer kommunikativen Leistung, ihren Aufbauprinzipien und ihrer Entwicklung befragt. Kriterien der Untersuchung sind die wachsenden Anforderungen internationaler Kommunikation und die Erfahrungen im Gebrauch der „künstlichen Sprachen".

Interessentenkreis: Sprachwissenschaftler aller Disziplinen

(En la eldonprogramo de Akademie-Verlag Berlin por 1985 oni anoncas la aperon de la libro „Planlingvoj en teorio kaj praktiko" de Detlev Blanke. Ĝi estos ĉirkaŭ 350 paĝojn ampleksa kaj kostos ĉirkaŭ 25 markojn. Mendo-numero 7535643. Ĝi estas mendebla en socialismaj landoj en la librovendejoj por fremdlingva literaturo, en aliaj landoj oni sin direktu al internacia libro-vendejo aŭ rekte al Buchexport, 7010 Leipzig, Leninstraße 16. Esperantistoj povas ĝin mendi ankaŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio)

KONTRAKTO

inter

Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

Dum la 69-a Universala Kongreso en Vankuvero UEA kaj MEM subskribis jenan kontrakton:

1. MEM estiĝas kunlaboranta neneŭtrala faka asocio de UEA en la senco de par. 15 de la Statuto de UEA.
2. MEM en siaj internaciaj rilatoj kaj laboro por defendi la pacon surbaze de la bazaj statutaj principoj, instigas senatende al utiligo de Esperanto, paralele kun la naciaj lingvoj.
3. MEM klopodas plivastigi la reton de la fakdelegitoj de UEA pri paco kaj pacmovado.
4. MEM aktive kunlaboras en programoj kaj aktivecoj de UEA bazitaj sur reciproka intereso kaj respekto.
5. MEM pagas al UEA jarkotizon egalvaloran al tiu de unu individua membro-abonanto, laŭ la nederlanda tarifo.
6. UEA disponigas senkoste al MEM unu salonon dum la UK-oj por fakkunveno.
7. UEA reciproke informos kaj konsultos MEM pri ĉiuj eventualaj programoj koncernantaj la pacmovadon.
8. UEA publikigos ĉiujare tekston en sia Jarlibro pri MEM, interkonsente kun ĝi.
9. UEA kaj MEM reciproke publikigos en siaj revuoj informartikolojn.
10. UEA kaj MEM speciale akceptas komunan agadon por realigi la celstrebojn de la 100jara jubileo de Esperanto.
11. Tiu ĉi kontrakto ne plu validas, se:
    a) la supera instanco de unu el la kontraktintoj konstatas, ke la kontrakto ne estas plenumata.
    b) unu el la kontraktintoj deklaras la kontrakton nula, kiukaze necesas trimonata averto.

Por Mondpaca Esperantista Movado	Por Universala Esperanto-Asocio
Prezidanto:	Prezidanto:
(d-ro Imre Pethes)	(Grègoire Maertens)

El la distriktoj

Tre imitinda iniciato en Frankfurt: forumo

La Distrikta Estraro de GDREA, sub la gvido de Bärbel Kulisch, organizis tre bonan utilan aranĝon. Ĝi invitis la 20an de oktobro 1984 al Strausberg ĉiujn membrojn de la Estraro al forumo kun la unua sekretario de la distrikta estraro de Kulturligo Frankfurt/Oder, Heinz Ulber kaj kun d-ro Detlev Blanke, sekretario de GDREA. Dum la trihora senĉesa interrompa diskutado kun la interesitaj membroj oni klarigis kaj tuŝis multajn esencajn problemojn de la laboro de Kulturligo ĝenerale kaj de GDREA en Kulturligo aparte. La aranĝo klare montris, ke estas bezono kaj neceso al tiuj senformalaj diskutoj kaj interŝanĝo kun gvidaj reprezentantoj de Kulturligo. Aparte ĉe nove aktiviĝintaj funkciuloj de GDREA ofte mankas scioj aŭ spertoj pri la agado de GDREA kaj de Kulturligo. Sed samtempe ili metas demandojn kaj problemojn nepre serioze konsiderendajn de la estraro.
Konkludo por aliaj Distriktaj Estraroj de GDREA: Organizu plenkunsidon de via distrikta estraro kaj invitu kiel diskutpartneron la unuan distriktan sekretarion de KL kaj la prezidanton aŭ sekretarion de GDREA. Sed nepre la membroj bone preparu sin por eluzi la eblecon demandi, diskuti, proponi.

Interesa sperto — Rostock

Dum la monatoj septembro ĝis decembro 1984 en la distriktoj de GDR okazis aktivulaj konferencoj de la distriktaj organizajoj de Kulturligo. Tiuj konferencoj havis la celon, bilanci — kvazaŭ sur duona vojo — la laboron faritan inter la 10a (1982) kaj la 11a (1987) kongreso de Kulturligo kaj montri aktualajn taskojn kaj problemojn. GDREA, kiel firma parto de Kulturligo, kunpreparis kaj kunpartoprenis la konferencojn, kiujn ĉeestis meze 200 personoj. La esperantistoj ĝenerale estis bone menciistaj en la ĉefreferajoj kaj kelkfoje eĉ prezentis memstarajn diskutkontribuojn. Mi havis la eblecon partopreni la konferencon en Rostock, kiu okazis la 30an de novembro 1984.
GDREA estis reprezentita jenamaniere:
1. Partoprenis esperantistoj.
2. En sia ĉefa referajo la prezidanto de la Distrikta Estraro de Kulturligo Rostock, prof. d-ro Külz tre detale valortaksis la agadon de la esperantistoj en la distrikto Rostock substrekante ties internaciismajn aktivecojn.
3. La prezidanto de la Distrikta Estraro de GDREA, Werner Plate, prezentis tre bonan diskutkontribuon kaj konvinke reliefigis la valoran agadon de GDREA. Li ankaŭ menciis la jubileon de Esperanto 1987.
4. Ekspozicio de Hans-Joachim Borgwardt el Stralsund pri la temo ‚Esperanto kaj paco' (dulingva) estis tre impresa, cetere la sola eksponajo entute.
La granda avantaĝo de la membreco de GDREA en Kulturligo de GDR denove evidentiĝis, i.a. tiel:
1. GDREA estas parto de prestiĝa organizajo kaj tial ankaŭ povas profiti la prestigon.
2. La konferencon partoprenis la plej gravaj distriktaj reprezentantoj de la diversaj sekcioj kaj fakoj de Kulturligo. Ili povis bone informiĝi pri la agado de GDREA.
3. La funkciuloj de GDREA, aŭskultinte la kontribuojn de la aliaj fakestroj, lernis eblecojn de kunagado.
4. Gravaj distriktaj kaj lokaj aŭtoritatoj de partioj, administrejoj amasaj organizajoj kaj aliaj instancoj, i.a. de la universitato, spertis, ke Esperanto estas serioza afero, lernata, kultivata kaj aplikata en serioza kultura organizajo.
5. Kaj fine, la konscio de GDREA, ke ĝi apartenas al tia grava organizajo kiel Kulturligo, ankaŭ estas stimula por la membroj kaj funkciulo.
Rostock estis interesa sperto.
Intertempe ni eksciis, ke similajn spertojn GDREA faris ankaŭ en aliaj distriktaj aktivulaj konferencoj de Kulturligo, i.a. en Schwerin, Berlin, Frankfurt/Oder.

D. B.

Achtung! Kursleiter

Beim Zentralvorstand ist ein 4seitiges vervielfältigtes Material „Lingvaj ludoj dum la instruado de Esperanto" erhältlich. Es wurde von Sabine Fiedler aus Leipzig erarbeitet. In der Vorbemerkung heißt es:
La praktikado de nova leksiko en formo de ludoj aŭ konkursoj estu esenca parto de ĉiu lingva instruado. Lingvaj ludoj povas servi por la firmigo kaj sistemigo de leksiko. Ili prezentas formon de la aplikado kaj pliampleksigo de lingvaj konoj.
Kiel ŝercoj kaj kantoj lingvaj ludoj krome aranĝas la instruhorojn en varia maniero kaj donas al la lernado de la lingvo novan ĉarmon. Tiamaniere ili stimulas la aktivecon de la kursanoj. Tio estas grava speciale por la instruado de Esperanto en la Popola Vespera Lernejo aŭ dum semajnfinaj kursoj, kie la lernado de la lingvo estas libervola kaj la kursoj konsistas el personoj ekstreme diversaj laŭ klereco, aĝo kaj antaŭkonoj.
La materialo enhavas kelkajn lingvajn ludojn, kiuj montriĝis taŭgaj dum multjara instrulaboro en la Popola Vespera Lernejo kaj dum semajnfinaj kursoj. Ilia vico respondas al la aplikebleco, komenciĝante por la famkonata ludo „Mi vidas ion, kion vi ne vidas" por praktiki la akuzativon (aplikebla de la 3a leciono laŭ la lernolibro de Dahlenburg/Liebig) kaj finiĝante per speciala ludo pri homonimoj (konvena por klubvesperoj).

Jasov — Cottbus

De la 8a ĝis la 20a de julio 1984 partoprenis 5 geesperantistoj el Hoyerswerda SELKOn en Jasov. Inter ili estis la prezidantino de la distrikto Cottbus. Ĉar Cottbus kaj Košice estas ĝemeldistriktoj ambaŭ respondeculoj uzis la okazon por fiksi kontrakon inter la du distriktoj. Estas planita la interŝanĝo de gastoj, spertoj kaj Esperanto-eldonajoj. (SELKO — **S**omera **E**speranto **L**ernejo apud **KO**šice)

Amika semajno kun ĝemelurbanoj en Schwerin

Okaze de la 35a datreveno de la fondiĝo de GDR la distrikta organizaĵo de GDREA en Schwerin invitis de 7. — 14. 10. 84 reprezentantojn el ĝemelaj urboj.
Venis kvar hungaroj el Pécs, du ĉeĥoj el Česká Třebová kaj unu estona amiko el Tallinn. Krom klubvesperoj, gvidadoj tra la urbo, tra la muzeo kaj la kastelo en Schwerin ni organizis vojaĝon al Güstrow por rigardi la urbon kaj viziti la ekspozicion de skulptaĵoj de Ernst Barlach.
Ankaŭ la veturado al la insulo Poel, la mallonga restado ĉe la Balta Maro kaj la vizito en Wismar kreis neforgeseblajn impresojn. La semajna programo inkluzivis plue viziton de grupeto de komencantoj en la urbeto Neustadt-Glewe.
Antaŭ la memoriga monumento „La Patrino" la gastoj omaĝis al la sufera marŝo de miloj da arestitoj el la faŝisma koncentrejo Sachsenhausen, kiu finiĝis komence de majo 1945 antaŭ la pordegoj de la urbo Schwerin. En silenta memoro la esperantistoj metis florojn antaŭ la memorejo. Poste la gastoj, la gastigantoj kaj estraranoj estis akceptitaj en ŝverina Domo de la Kulturligo, i. a. de reprezentantoj de la Kulturligo. Ankaŭ ĵurnalistoj uzis la eblecon aŭskulti la prezentadojn de la eksterlandanoj kaj la paroladojn inter la esperantistoj, kiuj rilatis al la 35a naskiĝtago de nia respubliko kaj la kunlaboro inter la ĝemelurbanoj.
Kulmino de la internacia aranĝo estis la distrikta renkontiĝo en Schwerin, la 13. 10. 84. Resume ni konstatas, ke la amikaj kontaktoj inter la gesamideanoj de la distrikto Schwerin kaj la ĝemelurboj Tallinn, Pécs kaj Česká Třebová pliprofundiĝis.

Elli Güse, Schwerin

Distrikta renkontiĝo en Schwerin

La 13an de oktobro 1984 40 esperantistoj partoprenis la tradician distriktan renkontiĝon, kiun partoprenis 7 eksterlandanoj el ČSSR, Hungario, kaj Soveta Unio. La renkontiĝo estis dediĉita al la 35a datreveno de la fondiĝo de GDR. Inaŭgurante la aranĝon la operkantisto de la ŝtata teatro Schwerin, Michail Tschergoff, kaj la ĉeĥino M. Valeska prezentis kantojn. La prezidanto de la distrikta estraro de GDREA en Schwerin, Kurt Güse, resumis la historion de GDR kaj prilumis la agadon de la esperantistoj. La estona gasto, Eduard Rans, prezentis lumbildojn pri Tallinn kaj Pern. Pri sia urbo Pecs parolis la hungaro J. Nemeti. Kulmino de la renkontiĝo estis la parafo de interkonsento pri amikeco kaj kunlaboro inter la Estona Filio de ASE kaj la Distrikta Organizaĵo Schwerin de GDREA pere de E. Rans el Tallinn kaj Kurt Güse.
La sukcesa renkontiĝo stimulos al novaj agadoj.

(laŭ Franz-Peter Kurtz)

Esperanto ĉe Inĝeniera Altlernejo Zittaŭ

Estas grava tasko plifortigi aŭ almenaŭ komenci celdirektitajn aktivecojn koncerne Esperanton en universitatoj kaj altlernejoj, ankaŭ en GDR. Tie ne nur laboradas jam multe da scienculoj, sed tie ja estas edukataj kaj instruataj la estontaj fakuloj, sciencistoj kaj gvidantoj pri ĉiuj sferoj de nia socialista socio. Ĉu ne estas gravege, informi ilin jam dum la tempospaco de studado pri la eblecoj de Esperanto kaj pri la celoj de la esperanto movado en la socialismaj landoj, kaj eble eĉ atingi, ke parto de ili uzados la internacian lingvon kaj kunlaborados en la esperanto-movado? Kompreneble estas ankaŭ grava tasko tiel agadi jam en la lernejoj, sed nepre ni faru tion eble plej baldaŭ en ĉiuj altlernejoj kaj universitatoj.
Sciante ke en nia altlernejo minimume kvin personoj nun laboras aŭ studas, kiuj jam okupiĝis pri Esperanto, mi demandis min, ĉu ne estus eble ekzistigi laborrondeton pri Esperanto ĉe la altlernejo. Mi interkonsiliĝis kun la estro de nia subdistrikta laborgrupo, kun la prezidanto de DE Dresden kaj kun la prezidanto de la subdistrikta estraro de Kulturligo de GDR, kiu samtempe estas scienca kunlaboranto de nia altlernejo. Ĉiuj konsultitoj pledis por la fondiĝo de tia grupo. Tial mi unue direktis leterojn al la rektoro kaj al la unua sekretario de la altlerneja partiestraro por informi ilin pri la fondota laborrondeto. Poste dum oktobro mi realigis informkampanjon pri Esperanto per afiŝoj en la ĉefaj konstruaĵoj kaj per leteroj al ĉiuj sindikataj grupoj de la altlernejo. Mi ankaŭ skribe kaj buŝe informis kaj invitis ĉiujn gestudentojn de la unua kaj dua studjaroj unufoje antaŭ la prelegoj. Krome mi direktis invitleterojn al ĉiuj altlernejanoj, pri kiuj mi scias, ke ili jam okupiĝis aŭ interesiĝas pri Esperanto.
Tiamaniere preskaŭ ĉiuj altlernejanoj estis informitaj pri Esperanto kaj ankaŭ invititaj partopreni prelegon pri la internacia lingvoproblemo, pri ties solvebleco helpe de planlingvo, pri la plej gravaj ecoj de Esperanto kaj pri la hodiaŭa signifo de tiu-ĉi internacia planlingvo. Bedaŭrinde ĉeestis nur 17 personoj, inter ili 10 gestudentoj, kiuj kun intereso aŭskultis kaj poste diskutis la tuŝitajn problemojn. Grave estas, ke la prorektoro pri sociaj sciencoj partoprenis la aranĝon kiel oficiala reprezentanto de la estraro de nia altlernejo. Li pledis por la fondota laborrondeto, taksis ĝin kiel riĉigon de la spirita kaj kultura vivo en la altlernejo kaj promesis al ĝi la subtenon flanke de la altlerneja estraro.
Poste fondiĝis la laborrondeto pri Esperanto ĉe Inĝeniera Altlernejo Zittaŭ enkadre de la jam ekzistanta altlerneja grupo de Kulturligo de GDR. Ĝian laboron intencas regule partopreni ses sciencaj kunlaborantoj kaj dek unu gestudentoj. Necesas organizi lingvokurson por komencantoj, ĉar 12 gerondetanoj ĝis nun ne okupiĝis pri Esperanto.
Mi tiel detale priskribis ĉion por vidigi la fakton, ke ankaŭ en altlernejoj kaj eblos interesigi homojn por Esperanto kaj estos subtenataj tiaj aktivecoj. Konsentite, ke en nia malgranda altlernejo verŝajne estis favoraj cirkonstancoj por fari tiun-ĉi unuan paŝon. Kompreneble ĝi nur estas paŝeto kompare kun la ankoraŭ solvendaj problemoj. Ĉi-rilate estus certe granda helpo por nia rondeto, ekscii la spertojn kaj la labormanierojn de aliaj ĉe altlernejoj jam ek-

Laste aperis

(Tio estas nur bibliografio kaj **ne** librooferto de GDREA.)

— Akademiaj studoj 1984, red. R. Eichholz (1922). Bailiebero: Esperanto Press, 1984. 135 p. Mimeo. 30 cm. Plejparte represoj de 26 artikoloj pri landnomoj, aspektoj kaj majuskloj.

— De Patronia al Ŝekspir. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, parto 2, volumo 1. Kioto: Elodonejo Ludovikito, 1984. 16 + 439 p. Ilus. de M. Fruscieva. 22 cm. La unuaj tradukoj de Zamenhof de 1887 ĝis 1895, reproduktitaj laŭ la originalaj presaĵoj.

— Ekofuturo, komp. Marinov. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1984. 420 p. Ilus. Mimeo. 21 cm. Dudek sep diverslandaj kontribuoj sub tri sekcirubrikoj: Nuntempa ekologio kaj teoriaj problemoj, Naturaj riĉfontoj kaj estonteco kaj Estonteco kaj energio.

— Faktoj kaj fantazioj, Marjorie Boulton (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 431 p. Ilus. 21 cm. ISBN 92 9017 028 X. Legolibro por progresintoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj de i. a. fabeloj, rakontoj kaj kuriozajoj el la tuta mondo.

— Febro, István Nemere (1944). Budapesto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 131 p. 20 cm. ISBN 963 571 143 3. Originala romano de aŭtoro bone konata pro sia elstara parola stilo. *)

— Hejmoj de birdoj, Ju Zi. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1983. 37 p. Kolorilus. de Wu Daisheng. 21 cm. 88-Es-203P. Plenkolora infanlibreto pri birdoj kaj ties nestoj.

— Kiu estas Jozefo?, Johán Valano kaj Vjekoslav Ivezić Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1984. 18 p. Ilus. 21 cm. Bildstria rakonto en facila lingvaĵo, verkita kiel ekzercolegaĵo akompane al „la zagreba instrumetodo".

— Kongresa libro; 69a Universsala Kongreso de Esperanto, red. Diccon Masterman. Rotterdam: UEA, 1984. 97 p. Ilus. 21 cm. La oficiala informilo por la UK en Vankuvero, kun interesaj artikoloj pri Kanado kaj resumoj pri prelegoj de Internacia Kongresa Universitato ktp.

— Lenore/Lenora (1773), Gottfried August Bürger (1747 — 1794). El la germana trad. R. Haupenthal. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 25 p. 20 cm. Jubilea Eldonserio 2; Beletro tardukita 6. Dulingva: Esperanta-germana. Balado de aŭtoro, kies verkoj estas konataj per sia originaleco, tensio kaj energia ritmo.

— Lineamenti di lessiografia dell' esperanto, Pietro Rizzo. Pisa: Edistudio, 1983. 61 p. 24 cm. Ampleksa itallingva kritiko de la vortaro Vocabolario italiano-esperanto (Verona, 1981) kaj la Esperanta leksikografio ĝenerale.

— Ludoviko en Nederlando (1957), Pierre Delaire. Orleano: Centre National Espéranto-Office, 1984 (represo). 48 p. Ilus. 21 cm. Dek-ĉapitra legolibreto por progresantoj.

— Mi serĉas mian perditan . . . (1976), Shel Silverstein. Esperantigis So Gilsu. Seulo: Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1983. 107 p. Ilus. 22 cm. Simpla rakonto por infanoj.

— Opetusministeriön esperantotyöryhmän miustio. Helsinki: Opetusministeriö. 57 p. Tabeloj. Mimeo. 30 cm. Opetusministeriön työryhmien muistioita 1984: 19. ISSN 0359—761 X. Oficiala raporto de la Edukministerio de Finnlando pri la pozicio de Esperanto, kun rekomendoj; resumoj en Esperanto kaj la sveda.

— Ora Pozidono, La Julian Modest (1952). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 68 p. 20 cm. ISBN 963 571 1328. Originale verkita rakonto. *)

— Pensoj kaj protestoj, Feiko Munniksma (1915). Kopenhago: Eld. Perspektivo, 1984. 37 p. Ilus. 21 cm. Japanstila poemo, akompanata de japanstilaj tuĉpentraĵoj de Pierre Gaborit (1924).

— Pioniroj kaj veteranoj de MEM; Skizoj kaj rememoroj, Nikola Aleksiev. Sofio: Bulgara Esperantista Asocio, 1983. 68 p. Ilus. 20 cm.

— Rabeno de Baĥarah, La (ĉ. 1835), Heinrich Heine (1797 — 1856). El la germana trad. L. L. Zamenhof (1924). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984 (represo). 47 p. 19 cm. Jubilea Eldonserio 2; Beletro tradukita 7. Prozaĵo de verkisto de mondliteratura formato en Zamenhofa traduko.

— Revenas mi, Jak Le Puil. Pisa: Edistudio/La kancerkliniko, 1984. Kaseto, kun tekstolibreto (10 p., 21 cm). Muzika kulturo. Dek kantoj, originialaj kaj tradukitaj.

— Robaioj, La, Umar Kajjam (ĉ. 1045-ĉ. 1122). El la persa trad. (1953) Gaston Waringhien (1901). Antverpeno/La Laguna/Chapecó: TK/Stafeto/Fonto, 1984 (2a eld.). 107 p. 21 cm. ISBN 90 3660 032 0. Unu el la famaj peomoj de la mondliteraturo, kun ampleksaj antaŭparolo, enkonduko kaj notoj.

---

zistantaj laborgrupoj. Krom tio ni volonte ekscius la opiniojn pri la komence de tiu-ĉi artikoleto menciita tasko por esperantistoj en universitatoj kaj altlernejoj. Bonvolu direkti viajn respondojn al jena adreso: Ingenieurhochschule Zittau, DDR — 8800 Zittau, PF 261 · Arbeitsgemeinschaft Esperanto, z. H. Dr. O. Becker. Doc. Dr. O. Becker

— Scienca interlingvistika simpozio, red. Ryszard Rodicki. Varsovio: Akademickie Centrum Interlingwistyczne, 1984. 160 p. 21 cm. Acta Interlinguistica. Dudek naŭ prelegoj el la 11a Scienca Interlingvistika Simpozio, kiu okazis en Varsovio en aprilo 1983.

— Sferoj — 3; Sciencfikcio kaj fantasto, div. aŭtoroj. Komp. Miguel Gutierrez Aduriz. Santandar: la kompilinto, 1984. 130 p. Ilus. 19 cm. ISBN 84 398 1230 2. Dek du sciencfikciaj rakontoj originale verkitaj en Esperanto de ok aŭtoroj. Bela grafika prezento.

— Shijieyu shi (1911/27), Edmont Privat (1889 — 1962). El Esperanto en la ĉinan trad. Zhang Hongfan. Pekino: Zhishi Chubanshe, 1983. 290 p. Ilus. 19 cm. Ambaŭ partoj de Historio de la lingvo Esperanto de Privat, kun artikolo de la tradukinto kaj antaŭparolo de Chu Tunan.

— Sindonema arbo, La (1964), Shel Silverstein. Esperantigis So Gilsu. Seulo: Korea Ligo de Esperantistaj Instruistoj, 1983. 59 p. Ilus. 22 cm. Vorte kaj desegne ĉarma rakonto pri la rilato inter homo kaj arbo, ne sole por infanoj.

— Tuta Esperanto, La; Gramatiko por progresintoj, gvidilo por kursestroj (1983), Henrik Seppik (1905). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984 (3a eld.). 184 p. 19 cm. ISBN 963 571 127 X. Praktike verkita gramatiko kaj stila gvidilo. *)

— Vivo de Sándor Körösi Csoma, La, Ferenc Szilágyi (1895 — 1967). El la hungara trad. Ervin Fenyvesi. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 151 p. Ilus. 20 cm. ISBN 963 571 139 5. Biografio pri la hungara aventuremulo kaj poligloto Sándor Körösi Csoma (1784 — 1842), kiu vojaĝis tra Azio al Tibeto, kie li fondis la tibetologion. Verkita de fama Esperanta aŭtoro, kun bela grafika prezento. *)

— Dilemoj de la nuntempo — vide el Hungario, red. Sándor Révész. El la hungara trad. diversaj. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 101 p. Tabeloj. 21 cm. ISBN 963 571 081 X. Ses artikoloj de ses aŭtoroj pri sociaj, ekonomiaj kaj komunikadaj problemoj. *)

— Etaj rakontoj. Eduardo Novembro. El la portugala trad. la aŭtoro. Lisbono: Portugala Espereranto-Asocio, 1984. 129 p. 18 cm. Dek kvin tradukitaj rakontoj kaj unu originala.

— Eŭlalia, Lorjak (pseŭd.). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 188 p. 20 cm. ISBN 963 571 126 3. La kvina originala romano de la aŭtoro de Neologisme, Transe, Retoj kaj Regulus.*)

— Gardi la pacon, zorgi pri la bono de la popolo, K. U. Ĉernenko. El la rusa trad. L. Novikova kaj B. Kolker. Moskvo: Novosti, 1984. 29 p. 20 cm. Oficiala parolado.

— Geologio internacia, Volumo 5. Div. aŭtoroj. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 172 p. (+ 83 p. da anoncoj). Ilus. Tabeloj. 21 cm. ISBN 963 571 123 9. Dek sep fakaj studoj de diverslandaj aŭtoroj, kun suplementa tabelaro. *)

— Instruoj de Budho- La, Tokio: Bukkyo Dendo Kyokai, 1983. 310 p. 19 cm. Bind. ISBN 4 89237 029 0. Prezento de la historio, esencaj instruoj kaj praktikado de la buhdismo.

— Internacia geedziĝo. Yokohama: Esperanta Virina Asocio, 1983. 83 p. Tabeloj. 26 cm. Rezultoj kaj analizoj de enketo pri 66 internaciaj geedziĝoj esperantistaj, kune kun sep artikoloj.

— Johano la Brava (1845), Sándor Petöfi (1823 — 1849). El la hungara trad. (1923) Kálmán Kaloscay (1891 — 1976). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984 (4a eld.). 60 p. 21 cm. ISBN 963 571 138 7. Kvazaŭ „popolfabelo en versoj", la plej populara el la longaj verkoj de Petöfi, la nacia poeto de Hungario, kun postparolo de Vilmos Benczik. *)

— Lingvo internacia en perspektivo-5, Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1984. 46 p. 26 cm. Seria n-ro 5. Dulingva. Esperanta kaj japana. Tri prelegoj: „Kibernetika teorio kaj empiriaj rezultoj de la lingvo-orientiga instruado de la Internacia Lingvo — kiel bazo de pliposta lernado de etnaj lingvoj" de Helmar Frank, „Aktualaj aspektoj de la lingvoinstruado en multlingva Respubliko Bharato" de Probal Dashgupta kaj „Lingvistika tipologio kaj lingvolernado" de Dan Maxwell.

— Neforgeseblaj kongresoj, La. Iam kompletigota plena verkaro de L. L. Zamenhof, kajero 7-bis. Kioto: Eldonejo Ludovikito 1984. 303 p. Ilus. de M. Fruscieva. 22 cm. Represoj plejparte el Lingvo internacia, Ruslanda esperantisto kaj La revuo el la jaroj 1905 kaj 1906.

— Ombro sur interna pejzaĝo, Spomenka Štimec (1949). Pisa: Edistudio, 1984. 141 p. 22 cm. Bind. ISBN 88 7036 019 9. Intima aŭtobiografia romano de konata aktivulino de la Esperanto-movado.

— Pitoreska Pekino, Ĉeng Limin kaj Šen Taŭ. El la ĉina trad. Zoŭ Guochiang, Hju Vanfen kaj Lu Binŝeng. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 72 p. Ilus. Mapo. 19 cm. 17-Es-1827 P. Historia kaj turisma priskribo de la vidindaĵoj de Pekino. Kun plenkoloraj fotoj.

— Vortaro de Esperantaj rimoj (1905), Joseph Rhodes (1856 — 1920). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1984. 23 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 9. Fotorepreso de la unua Esperanta rimvortareto.

— Aforismoj, Šota Rustaveli. El la kartvela trad. Zurab Aleksandrovič Makaŝvili. Tbiliso: Mecniereba, 1983. 78 p. Mimeo, 20 cm. Dulingva: kartvela-Esperanta. Elektitaj aforismoj de la plej fama kartvela poeto, verkitaj en la 12a jarcento.

— Ĉu vi pretas trinki teon ĉe malriĉuloj? Stefano Keller. La Chaux-de-Fonds: Kultura Centro Esperantista, 1984. 12 p. Mimeo. 30 cm. La Esperanta agado en Srilanko kaj ties problemoj, spertitaj de la aŭtoro.

— Danco ĉirkaŭ lokomobilo (1971), Mats Traat (1936). El la estona trad. Hillar Saha kaj Henrik Seppik. Tallinn: Eesti Raamat, 1984. 174 p. 17 cm. Romano pri la estona kampara vivo, de fekunda nuntempa prozisto kaj poeto.

— Esperanta antologio; Poemoj 1887 — 1981, red. William Auld (1924). Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld.). 12 + 888 p. Ilus. 22 cm. Bind. Jubilea Kolekto Jarcento de Esperanto, n-ro 1. ISBN 92 9017 030 1. Reviziita kaj kompletigita eldono de la fama Esperanta antologio (1958). Pli ol 850 originale verkitaj poemoj de 163 poetoj, kolektitaj el revuoj kaj volumoj plejparte ne plu haveblaj. La antologio donas superrigardon pri la tuta poezia kulturo de Esperanto; kun Postparolo de William Auld kaj 36 paĝoj da biografiaj notoj.

— Espéranto et l'anné internationale des personnes handicapées 1981, L', Rotterdam: Universala Espeanto-Asocio, 1984. 8 p. 21 cm. ISSN 0165-2621. Documents sur l'Espéranto 17 F.

— Eta princo, La (1943), Antoine de Saint-Exupéry (1900 — 1944). El la franca trad. Pierre Delaire (1918). Montrealo: Kanada Esperanto-Asocio, 1984) (2a eld.). 93 p. Kolorilus. de la aŭtoro. 23 cm. Bind. ISBN 0 15 246503 0. Ŝatata fabela rakonto por infanoj.

— Evoluo de la trafiko kaj ĝia polucio, La, Hristo Marinov kaj Anna Székely. Sofio: Fervojista kaj Ekologia Sekcioj de BEA, 1984. 186 p. Ilus. Mapoj, Mimeo. 21 cm. Studoj pri ekologiaj aspektoj de la trafiko i. a. el Bulgario, Hungario, FR Germanio kaj Sovetunio.

— Language Behavior in International Organizations; Report, red. Jane Edwards kaj Humphrey Tonkin. Novjorko: Center for Research and Documentation on World Language Problems, 1984. 155 p. 28 cm. La kvin anglalingvaj kaj unu franclingva prelegoj de la 2a Konferenco de CED (Novjorko, 15 dec. 1983), kun komentoj kaj apendico pri CED.

— Legolibro por kursanoj, komp. Odd Tangerud. Oslo; la kompilinto, 1984. 53 p. Ilus. 23 cm. ISBN 82 991075 12. Kolekto de 26 diverstemaj tekstoj por progresintoj.

— Lingua esperanto; Corso di base, R. Corsetti, M. La Torre, N. Vessella. Pisa: Edistudio, 1984. 302 p. Ilus. 21 cm. ISBN 88 7036 016 4. Dekkvin-leciona, gramatike strukturita lernolibro por itallingvaj komencantoj, kun ofteca vortlisto.

— Lingvo kaj komunikado, div. aŭtoroj. Rotterdam: Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de TEJO, 1984. 41 p. Mimeo. 21 cm. Sep artikoloj pri la lingva flanko de la komunikado.

— Morta suito, La, Masao Miyamoto (1913). Kioto: L'Omnibuso, 1984. 169 p. Ilus. 21 cm. Vivrakonta romano pri la japana anarkiisto-esperantisto Sakae (Ei) Oosugi 1885 — 1923).

— Nova minaco al Eŭropo: kiu kulpas? El la rusa trad. V. Arolovič. Moskvo: Novosti (APN), 1984. 40 p. Ilus. 22 cm. Pri nuklea armado.

— Obstacles linguistiqeus face au nouvel ordre mondial de l'information et de la communication, Les, M. Mustapha Masmoudi. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 10 p. 21 cm. Documents sur l'Espéranto 15 F. ISSN 0165-2621. Prelego el la inaŭguro de la Universala Kongreso en Antverpeno, 1982.

— Parnasa gvidlibro (1932), Kálmán Kalocsay (1891 — 1976), Gaston Waringhien (1901), Roger Bernard (1907). Pisa/Madrido: Edistudio/Heroldo de Esperanto, 1984 (3a eld.). 208 p. 21 cm. ISBN 88 7036 018 0. ‚Manlibro de la Esperanto poetiko' reviziita kaj kompletigita de Gaston Waringhien. Unue la metrikon (ritmon, versojn, strofojn) analizas Waringhien, poste C. E. R. Bumi (= Kalocsay) ne longa didaktika sed sprite atentokapta poemo donas valorajn konsilojn en sia ‚Arto poetika', fine Waringhien kaj Bernard liveras ĝisdatan rimvortaron; kun glosaro.

— Poliglota vortaro, Mahmud Moŝkeri. Tehrano: la aŭtoro 1984. 10 + 487 p. Ilus. 25 cm. Bind. Vortaro persa-angla-franca-itala-Esperanta, kun unuvortaj ekvivalentoj ordigitaj laŭ la persa.

— Radioteknika artikolaro, red. László Szilvási. Budapeŝto. Scienca Eldona Centro de UEA, 1984. 64 p. (+ 20 paĝoj da reklamoj). Ilus. 24 cm. ISBN 963 571 1166. Kolekto de 23 altnivelaj artikoloj pri tre diversaj radioteknikaj temoj, kun terminareto kaj listo de eldonaĵoj. *)

— Svedaj birdoj: Vortlisto, Malte Markheden. Sjöhaga: la kompilinto, 1984. 29 p. Mimeo. 21 cm. Ornitologia terminareto dudirekta: sveda, Esperanta; kun aldono de la latina birdnomo.

— Unesco et l'UEA 1976 — 1983, L'. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 1984. 20 p. 21 cm. Documents sur l' Espéranto 18 F. ISSN 0165—2621.

— Vortoj de Andreo Cseh, komp. Ed. Borsboom. Saarbrücken/De Bilt: Artur E. Eltis/Societo Andreo Če, 1984. 208 p. 21 cm. Jubilea Eldonserio: 3 Esperantologio 6. Sesdek ses diverstemaj, simplastilaj artikoloj de la fama pedagogo Andreo Cseh (1895 — 1979), kiuj aperis Esperante en la nederlanda semajngazeto Haagsche Post en 1935 — 36.

*) Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 102— Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9

Dua semajnfina tendaro en Sternberg

De 14an ĝis 16an de septembro 1984 okazis en Sternberg ĉe Schwerin dua semajnfina junulara Esperanto-tendaro. La naŭ geparto-prenantoj el distriktoj Schwerin, Neubrandenburg kaj Berlin migradis en la ĉirkaŭajo de Sternberg kaj vizitis maljunan esperantiston en Warin. Post komuna vespermanĝo en gastejo kaj ĉe tendara fajro kun kantado kaj diskuto finiĝis la dua tago. Ni decidis, ke ni volos renkontiĝi denove de 21an ĝis 23an de junio 1985 sur la tendaro B 13 (Plau ĉe la lago) al la tria semajnfina tendaro. Ni esperas, ke la partopreno estos granda. Skribu al: Rainer Birkholz, 2600 Güstrow, Leninring 1.

R. Birkholz

Letero de leganto sam- kaj malsamopinia

Kara redakcio!

Legante la tre interesajn „Pensojn pri lingvo, movado kaj ceter'" de d-ro István Nagy en „de" 4/84 mi plurloke devis konstati, ke mi samopinias pri la pli malpli modestaj rezultoj de kelkfoje pena movada laboro. Ofte oni legas, ke internacia lingvo fariĝis necesa pro diversaj kaŭzoj: ekonomiaj, kulturaj, turismaj ktp. Laŭ S. N. Podkaminer („Socialismo kaj Internacia lingvo", en Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado, HEA, 1978) Esperanton „postulis la gigante kreskintaj interŝtataj kaj interpopolaj ligoj; internacia komerco, diverskarakteraj internaciaj kontaktoj kaj renkontiĝoj sciencaj, politikaj, fakaj, sportistaj k. s. La grandskale evoluinta trafika tekniko kreis internacian turismon, kiun partoprenas nun ĉiujare centmilionoj da homoj ... Radio kaj televido estas ankaŭ forte bremsataj en sia tutmonda disvastiĝo pro la multlingveco. „Kaj precipe en la socialismaj landoj la „bezono de internaciaj ligoj atingas altan nivelon en la sfero de politiko, scienco, tekniko, arto, sporto kaj aliaj sferoj ... La neceso ekposedi internacian komprenigilon fariĝas pli kaj pli akre sentata." Mi tute konsentas pri tio, kaj tamen ekzistas tiu diferenco — eĉ, iusence, kontraŭdiro — inter la nivelo de la evoluo de la lingvo Esperanto kaj tiu de ĝia internacia apliko, kiun d-ro Nagy prave priskribas.

Sed mi ne konsentas kun li pri lia konstato, ke „la lingvon evoluigas fakuloj, lingvistoj, profesoroj de lingvoj". Ĉi-tiuj certe kontrolas, priskribas, traserĉas, komparas (ktp.) lingvojn, sed apenaŭ evoluigas ilin (eble escepte de la fakuloj). Se tamen, tiam nur dum relative mallonga tempo (kreo aŭ ŝanĝo de alfabeto, de literoj, ktp.), kaj poste la lingvoj evoluas tamen laŭ la parolmaniero de la lingvouzantoj (kiuj akceptas la novaĵojn aŭ ne). Do temas pri la samaj „simplaj" esperantistoj, kiuj unuflanke evoluigas la lingvon uzante ĝin (tio estas iom esperiga fakto koncerne la movadon). Certe por Esperanto plie gravas la skriba lingvo, tamen la amaso da korespondemuloj, verkistoj, tradukantoj kaj publicistoj de sciencaj k. a. traktajoj ne estas lingvistoj. Eble el tio — almenaŭ parte — klarigeblas kelkaj el la multaj demandoj de d-ro Nagy en la unua duono de liaj „Pensoj".

„Ĉu la vortoj de la vortaroj estas devigaj por la uzantoj?" Pli sube li mem respondas, ke „ilia uzo estas deviga", ĉar „la vortaroj ne enhavas neuzendajn kaj neuzindajn vortojn". Vortaroj estas aktualaj konstatoj de la evolua stadio de lingvo. Ne iu vortaro decidas pri la uzebleco de vortoj, sed male: la ĝenerala uzo („la vivo", kiel tion esprimas d-ro Nagy)decidas pri ilia enskribo en la vortaron. Kaj la rilato oficiala-neoficiala vorto? Kompreneble lingva instanco necesas por internacia lingvo. Sed kiam tiu instanco oficialigadas tro malrapide (kaj pro la grandega nombro da novaj vortoj precipe sur la kampo de scienco preskaŭ maleblas sufiĉe rapide reagi al la bezono de la fakuloj), tiam por la uzantoj de la lingvoj tiu diferenco perdas sian sencon. Ankaŭ por aliaj lingvoj ekzistas aŭ ekzistis lingvaj akademioj aŭ aliaj instancoj, kiuj limigis kaj tial restriktis la tutan uzatan vortaron al iu pli malpli artefarita vortostoko, kiun ili deklaris „neŝanĝeblan normon". Tamen krom kelkaj esceptuloj neniu interesiĝis pri tio kaj la plejmulto parolis kun siaj gepatroj, parencoj, geamikoj en ties maniero, do en la maniero de pli riĉa kaj tre kompleksa lingva tradicio.

Aliflanke multaj homoj ofte uzas vortojn, kiuj ne troveblas eĉ en la „plej plena" (ilustrita aŭ ne) vortaro de la lingva komunumo (la vortoj de t. n. sekretaj lingvoj en certaj sociaj rondoj; certaj modvortoj, kiuj abundas precipe inter gejunuloj; multaj novkreitaj vortoj ĉu kunmetitaj ĉu alimaniere formitaj, aŭ plej freŝaj fakterminoj, precipe, se ili venas el fremdaj lingvoj ktp.). El tio — laŭ mia opinio — konkludeblas por la demandoj en la unua parto de la artikolo de d-ro Nagy tio:

„Kiel paroli, verki, traduki? Ĉu per la oficialaj vortoj?" Kompreneble. „Ĉu per ĉiuj vortoj troviĝantaj en PIV?" Jes ja, se oni komprenas la signifon de ĉiu. „Ĉu per la PIV-vortoj kaj ankaŭ per la aŭtoraj vortoj?" Se oni scias, ke ekzistas vorto ekster PIV, kiu estas uzata ne nur en unusola Esperanto-grupo, tiam oni uzu ĝin. (Ofte certaj vortoj povas esti uzataj en unu regiono aŭ unu lando, se temas pri tipe etna esprimo, kelkfoje ankoraŭ ne trovebla en PIV.) Se mankas al PIV kaj al la parolata lingvo iu vorto, aŭ se al iu vorto mankas unu semantika nuanco, kiun oni bezonas kaj alimaniere ne trovas, oni proponu novan vorton klarigante ĝin; se ekzistas bezono je tiu vorto, ĝi estos ĝenerale uzata kaj iam poste akceptata de vortaroj. Preskaŭ ĉiu lingvo de la mondo prunteprenis tiel vortojn el aliaj lingvoj kaj laŭbezone enordigis ilin iom post iom en sian lingvosistemon. Tamen oni ne insistu pri tiu neologismo, se ĝi ne estas akceptata kaj se alia leksika rimedo estas uzata anstataŭ ĝi.

Kaj ĉu oni povas „verki, traduki kiel oni volas" nur klarigante „la signifojn de la vortoj en glosaro"? Tio neiĝas per la supra klarigo.

Ĉio-ĉi do estas ĉefe problemo de lingvoscio kaj de k o n s c i a lingvouzo; ĉi-tiu estas lernebla.

Ankaŭ mi nur „surpaperigis pensojn". Eĉ nur pri la unua parto de la artikolo, ĉar diskuto pri movadaj kaj propagandaj malfacilaĵoj ne nur koncernus organizajn problemojn, sed ankaŭ objektivajn sociajn, mondvaste eble eĉ politikajn, kiujn finsolvi hodiaŭ — mia opinie — ankoraŭ maleblas. Ulrich Becker

Recenzoj

Dudich, Endre: Ĉu vi konas la Teron? Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj. Scienca Eldona Centro de UEA. Budapest 1983. 150 p.

La deziroj por grave pliampleksigi la esperantlingvan sciencanfakan literaturon, naskis en 1981 la decidon establi la Sciencan Eldoncentron de UEA en Budapeŝto. Nun kuŝas antaŭ ni la unua libro de tiu ĉi centro, verkita de D-ro Endre Dudich, scienca vicdirektoro de la Hungara Ŝtata Geologia Instituto. La aŭtoro intencis atentigi la legantojn pri kelkaj el la aro de geologiaj scienco-brancoj kaj pri la plej aktualaj taskoj. Farante tion E. Dudich klopodis variigi la stilon de unuopaj ĉapitroj, kiujn li rigardas „kiel menu-karton por gustumi la geologiajn sciencojn." Estas rimarkinde, ke laŭ la literaturlisto de la 128 uzataj kaj rekomenditaj publikaĵoj estas 67 esperantlingvaj titoloj.

Unue ni konatiĝas kun variaj niveloj de organiziteco aŭ strukturiteco de ne vivaĵoj kaj vivuloj. La geonomiajn demandojn sekvas ĉapitro pri geokemio.

Parolinte pri milvizaĝa kristalmondo E. Dudich ekskursas kun ni tra la mondo de vulkanismo, tra tiu de transporto kaj demetiĝo de sablo ktp. Tiam ekparolas la rokoj, la magnorokaĵoj kaj sedimentrokaĵoj. Per la procedo de la fosiliigo kaj ties rezulto, la fosilioj, ni aŭdas pri la ekscita kaj enigma mondo de la pravivo. Pri la geosferoj de nia Tero, la variaj tektonikaj fenomenoj temas speciala ĉapitro. El la riĉega scenaro de la Terhistorio la aŭtoro travivigas nin tri „aktojn": La karbonion, la kretaceon kaj la historion de la lasta maro en Danuba baseno.

La ĉapitro pri aplikata geofiziko — verkita de A. Lukács — sciigas nin pri la plej moderna tekniko pri esplorado de la Terkrusto kaj la trovado de ekspluateblaj mineralkuŝejoj: La gravita, la magneta, la elektra, la sisma esploradoj.

Problemoj de aplikata geologio estas prezentitaj „helpe de fikcia ekzemplo, kvazaŭ foliumante dokumentojn de elpensita ministerio de elpensita ŝtato, korespondanta kun eĉ pli fantazia geologia firmao esperanta."

Post tiu ĉi prezentado, ne sen esperantista memironio, sekvas fine malgranda ĉapitro pri kosmologio kaj planedologio. Kiel aneksajon la libro entenas naŭpaĝan geologian leksikoneton.

La esprimmaniero de la aŭtoro estas komprenebla por vasta legantaro. Per la trafa divido de la teksto en alineojn la libro estas facile legebla. Rilate la preserarojn la libro estas zorgeme kontrolita. Sur la paĝoj 91 kaj 93 eraroj enŝteliĝis: Kompreneble la apero de la unuaj vivuloj okazis antaŭ 3100 milionoj da jaroj kaj ne — kiel indikite — antaŭ 3,1 mj. La preskvalito estas diversa kaj deziroj restas por tiun pliblonigi.
Entute la libro de E. Dudich estas leginda kaj rekomendinda al vasta legantaro. Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kulaur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 2

K. H. Simon

Henrik Seppik: La tuta Esperanto. Gramatiko por progresintoj. Gvidilo por kursestroj. Tria eldono. Hungara Esperanto-Asocio. Budapest, 1984. 184 paĝoj.

Niaj kursestroj kaj ĉiuj progresintoj, kiuj intencas pliprofundiĝi en la lingvon Esperanto, nun denove disponas pri dum jardekoj rekomendata praktika gramatiko kaj stila gvidilo de H. SEPPIK (estono laŭ deveno) „La tuta Esperanto". Ĝi estu uzata flanke de instruantoj ne kiel lernolibro, sed kiel enciklopedieto kaj konsililo, se temas pri duboj koncerne la esperantlingvan esprim-manieron aŭ pri instigoj rilate la enhavan pliriĉigon de instruhoroj.

Enkadre de la lernolibro „Taschenlehrbuch Esperanto" (Leipzig 1978, 1981, 1983) vi verŝajne jam trovis sur la paĝoj 160 — 162 ekzemplan peceton el pli frua eldono de „La tuta Esperanto", nome en la ĉapitro, kiu okupiĝas pri la por ni komplikaj verboformoj: La teksto „Mia unua skiado" pritraktas kaj konvinke prilumigas la ekzaktan uzadon de kunmetitaj verbformoj, de participoj kaj adverbaj participoj, la mallongigon de frazoj helpe de participoj kaj adverbaj participoj. Per tiu ĉi eltiraĵo el la libro de H. SEPPIK vi jam povis konvinkiĝi pri la kvalitoj de la menciita verko (la plena teksto troviĝas sur la paĝoj 46 — 48 de la tria eldono).

La enhavo estas vicigita laŭ gramatikaj subtemoj (artikolo, verbo kaj objekto, la konsisto de la vortoj, adverbo, prepozicioj . . .), kiuj siaflanke estas akompanataj de ekzemploj, taskoj, se antaŭvidatas danĝeroj en la ĝusta percepto aŭ uzado de certaj vortoj, esprimoj, konstruoj (ekzemple: la du signifojn de la vorto „krom" /p. 85/; la diferencon inter „de, da, el, je" en esprimoj, koncernantaj la mezuradon (p. 111/112; la klasifikon de la konstrue „la leciono finis" /anstataŭ „finiĝis"/ kiel eraron aŭ kiel mallongigon /p. 75/).

La titolo „La tuta Esperanto" nur ŝajne sugestas la supozon, kvazaŭ nia helplingvo estus senmova estajo; kontraŭe — la vorto „tuta" dialektike ampleksas kaj la neŝanĝendan fundamentan regularon kaj la neeviteblan disvolviĝon de Esperanto, ĉar ankaŭ ĝi kiel ĉiu vivanta lingvo subiĝis al la naturleĝo de kresko, disfalo kaj evoluo. Pro tio la libro ne nur informas la leganton, sed ankaŭ edukas lin al dialektika, nedogma pensado rilate Esperanton (aparta ĉapitro, n-ro 162, estas dediĉita al la evoluo de Esperanto).

Krome la verko rekomendiĝas per konsiloj al kursgvidantoj (bedaŭrinde nur tre mallongaj, p. 9 — 10) kaj al progresintoj (p. 169 — 172), per gramatika indekse (p. 173 — 175) kaj entute per tre klara aranĝo de la lingva materialo.

Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9

T. Dahlenburg

Malpermesata kritiko

Lorjak: „Eŭlalia", Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984, 186 paĝojn.

Ne demandu min, kiu estas Lorjak, kiu kaŝas sin malantaŭ tiu ĉi pseudonimo! Malgraŭ persone ne konate — kiel verkisto (mi supozas viron, ĉar sur la malantaŭa paĝo de la kovrilo rigardas min vira kapo kun rondaj okulvitroj — sed sen atentigo pri ties identeco. Ĉu Lorjak?) oni konas lin bone. El lia verkista plumo elfluis „Neologisme", „Transe", „Retoj", „Regulus" kaj „Iluzioj".

Ankaŭ ne demandu min, kiu estas Eŭlalia. Mi eksciis tion, sed mi ne volas forpreni vian scivolemon! Atendu la rezulton de via memstara legado . . . estos surprizo!

Surprizo estis — krom la ekscita enhavo de tiu ĉi krimromano — por mi multo alia. Tiel la manipulado de la Lingvo Internacia. Lorjak trovis vortkunmetaĵojn — parte amuzajn, sed ankaŭ parte konfuzajn. Ekzemplo por la lasta konstato: „Ĉu do je la **nunioma** horo vi ankoraŭ ne tagmanĝis?" (Estis cetere unu el la tre maloftaj kazoj, en kiu Lorjak komence de demandfrazo uzis la demandpartikulon — pleje ĝi mankas!). Oni jam devas cerbumi por ekkoni la sencon de **„nunioma"** pere de kunteksto!

Alia ekzemplo: „Do, ŝi rezignacie konsentis akcepti la pruntitan pijamon, kaj pasi **de sur al en** la liton". Kvar sinsekvaj prepozicioj — tiaj enigmaj taskoj ne plialtigis mian legoĝojon!

Ankaŭ mi perceptis kelkajn ĝenantajn parolturnojn, kiuj supozeble havas sencon en la nacia lingvo de Lorjak — sed la leganto esperantista en iu ajn lando ne kapablas tuj kompreni ilin. Sur paĝo 9 troviĝas: „. . . kiam aperos iu kun okulo en nigra kompoto . . .". Ni germanoj verŝajne dirus, ke iu posedas „bluan okulon" — sed, kiu povu kompreni tion ekstergermane?

Lasta reklamacio, rilatanta al la tipografo, kiu grafike aranĝis la tuton. Post legado de la unua triono de la firme bindita libro mi ekhavis problemojn, ĉar la kompostitaj linioj malaperis en la mezan randon de mia libro. Nur perforte mi fleksis la libron (kia postulo de libroamiko!) por ke mi povu daŭrigi mian legadon. Alian kompostformaton — kaj jam oni povus fari el mi preskaŭ kontentan leganton!

Do, resume: Kiu ne sin ĝenas pri la nomitaj malperfektaĵoj certe povos bone amuzi sin per tiu „Lorjak-aĵo". La verkisto, sur la lasta paĝo, memorigas siajn legantojn per postparolo (la plej mallonga, kiun mi legis ĝis nun): „Ne protestu. Vi estis avertitaj." Kaj tiaj vortoj, kiuj rilatas al la antaŭparolo de la libro, malpermesas ĉiujn kritikojn! Ĉu jes aŭ ne?

Joachim Schulze

Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 2

Sándor Petöfi: Johano la Brava.

Trad. K. Kalocsay. Hungara Esperanto Asocio, Budapest 1984, 60 p. ISBN 963 571 1381.

Petöfi estas estimata kiel la plej granda hungara poeto de la XIX. jarcento. Legante liajn poemojn senteblas lia senlima amo al lia pli malvasta patrujo, al la Granda Hungara Ebenaĵo, kiun li rigardis kiel simbolon de la libereco. Petöfi fariĝis konata en la jaro 1844, kiam, ĉesigante la vagabondan aktoran vivon, li iris al Peŝto, por serĉi eldoneblecon de siaj poemoj. En Peŝto Vörösmarty fariĝis lia patrono. Dank' al lia enfluo kaj la talento de Petöfi, ĝis fino de la jaro 1844 la juna poeto estis tutlande konata. Al tiu ĉi prospero helpis lin unuavice la verko „Johano la Brava", pri kiu Vörösmarty jene deklaris: „Tiu ĉi verko estus ekoro de la literaturo en ĉiu ajn lando."

En la agado de tiu ĉi „popolfabelo en versoj" kunplektiĝas la realaĵo kaj la fabelaĵo. La okazintaĵoj komenciĝas en la reala vivo. Antaŭ ni ekviviĝas la hungara vilaĝo, la ebenaĵo, la sorto de la vilaĝa loĝantaro en la XIX. jarcento. En la dua parto de la rakonto alvenas Janĉi al Felando, kie li trovas sian feliĉon. Johano la Brava estas vera fabela heroo. Kuraĝe li defendas sian amatinon. Ilnjon; fidele li amas ŝin. Li estas honesta, ĉar li ne volas la oron de rabistoj. Li luktas ĉiam por vereco kaj justeco. Johano la Brava — same kiel Ludas Matyi kaj Toldi Miklós — estas publike konata kiel karakteriza persono de la hungaroj.

Johano la Brava estas tradukita en multajn lingvojn, ĝin oni konas en multaj landoj. Igi ĝin pli populara helpas ankaŭ la esperantlingva traduko. Unuafoje ĝi estis eldonata en 1923 okaze de la 100-a datreveno de la naskiĝo de Petöfi. La tradukisto estis Kálmán Kalocsay. Lia agado en la Esperanto-movado estis multflanka: li estis poeto, aŭtoro de gramatikaj verkoj, ĉefredaktoro de Literatura Mondo, redaktoro de la Hungara Antologio. Liaj tradukoj (La tragedio de l'Homo de Madách, Romaj Elegioj kaj Taglibro de, Goethe, Infero de Dante, Reĝo Lear kaj Somermeznokta Sonĝo de Shakespeare) estas juveloj de la tradukarto. HEA aperigis la kvaran eldonon de „Johano la Brava" en la jaro 1984. La teksto samas kun la teksto de la dua eldono. La traduko fidele spegulas la popolan etoson de la poemo.

Tiu ĉi traduko estas proponinda por ĉiuj esperantistoj, kiuj volas konatiĝi kun la hungara literaturo kaj por tiuj, kiuj povas ĝui arte tradukitan esperantlingvan poemon.

Erika Bartos

Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9

Turisma oferto de Bulgario

Elĉerpiĝis la broŝuro kun turismaj ofertoj el Bulgario en 1985. Petante la broŝuron skribu al Internacia Esperanto-Kursejo, BG — 1202 Sofio, str. Makariopolska 4.

Adalberto Huleŝ: Katoj kaj Ĉevaloj, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1982

La liriko de Adalberto Huleŝ en ĉi tiu 80-paĝa libreto estas profunde filozofia. El la neelĉerpebla fonto de eblecoj rigardi la vivon li ĉerpas riĉe. En simpla kaj komplika formoj li prezentas siajn pripensadojn, kiuj montras la belecon kaj tristecon de la homa ekzistado, enkadrigita en naturo kaj kulturo, akompanata de bestoj, kontraŭrigarde al la eterneco.

Konsolaj estas atentigoj pri la naturo (Kion vi volas? Montras al vi sian verdon la herb'! aŭ Komence de printempo, ekz.) kaj simplaj aŭ ŝajne simplaj okazaĵoj (Momentfoto. Ludo per ia memoro. ekz.). Ili trankviligas pri la entute pli maltrankviliga tendenco de la poemaro.

Ĉu la besto estas kunulo de la homo aŭ enigmo? Certe kaj tio kaj la alia kaj multe pli. Ju pli oni okupiĝas pri la 116 versaĵoj, des pli amasiĝas demandoj kaj respondoj. Al ĉiu unuopa oni povus aldoni rakonton, ofte eĉ romanon.

Katoj kaj Ĉevaloj. La libreto havas ĉapitrojn: Antikvo. Homa Kanto. Ploro por la Medium Aevum. Notaĵoj de iu Pasaĝero, Katoj kaj Ĉevaloj. Eble la plej trafa titolo estintus Homa Kanto. La versaĵo sub la sama titolo karakterizu pli ol ĝeneralaj frazoj la libreton:

Tiel ĝi devis okazi!
Jen ĉio, kion mi komprenis kaj diri scipovas.
Homo mi naskiĝis; homa estas mia sorto,
miaj zorgoj, suferoj kaj ĝojoj.
Eĉ ne estas inde paroli pri ĝi —
kaj nur pri ĉi tio estas inde paroli:
pri amoj, elreviĝoj, timegoj,
pri aferoj ordinaraj, kiuj estas sekreto de sekretoj;
ne pri unu aŭ pri alia; pri la tuto samfoje —
ĉar ja ĝi estas tiel absurde strangega,
tiel absurde strangega . . .

Poem libron oni ne legas kiel romanon. Ĝi estas konsultlibro, sed konsultlibro, kiun oni devas koni antaŭ ol ĝi estas uzebla. Trafa fakto por la prezentita liriko de A. Huleŝ. Dankema mi estus, se la apostrofo ne tiom ofte aperus. Monika Ludewig

Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9

La aventuroj de Huckleberry Finn / Mark Twain. La bildrakonton verkis Tibor Cs. Horváth, desegnis Attila Dargay, esperanta teksto Tibor Vaskó. — Budapest: Hungara Esperanto-Asocio 1982. — 28 p.; 24 cm

Koncizigi romanon al 26paĝa bildrakonto ne eblas. Se eldonistoj tion tamen entreprenas, ili perfortas aŭtoron kaj verkon. La romano de Mark Twain, kiu laŭ la inica unupaĝa ĉapitreto, „certigis por si lokon en la mondliteraturo", nun legiĝas jene: „Onjo, ĉu Huck estas hejme?" — Vizitas iun tagon Tom Sawyer s-inon Douglas, la adoptan patrinon de Huckleberry Finn. — „Tute ne! Tute ne! Bruhaha! Li perdiĝis! Senŝpure! Bruhaha!" (paĝo 3, 1. bildo).

Sed — oni povas argumenti — bildo povas pli paroli ol mil vortoj. Certe, jes. Sed la desegnaĵoj de la „elstara hungara grafikisto" (laŭ anonco en la sama libro) Attila Dargay estas tro supraĵaj, por krei ian impreson pri vivo aŭ pejzaĝo laŭlonge de l'Misisipo. Kie estas la „ĉarmaj infanaj personaĵoj", pri kiuj la eldonistoj parolas? En la libreto mi nur trovis komikstriajn figurojn. La negro Jim, ekz., povus esti mokfiguro de iu rasista flugfolio.

Mi ankaŭ iomete dubas, ĉu la telegrama lingvaĵo vere utilas por „ekzerciĝi en la esperanta legado". La espero de la eldonistoj, ke homoj, kiuj pere de **tiu** bildrakonto unuafoje renkontiĝis kun la ĉefverko de Twain, sentos apetiton al la originalo, ŝajnas al mi pure retorika. Demando: Esperanto jam delonge havas sian kulturon, kial ĝi ne havu ankaŭ sian komikstrian kulturon? Respondo: Ĉar estas domaĝe pri la uzita bona prespapero. Jürgen Hamann

(Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Str. 9)

Esperanto survoje. Esperanto unterwegs. Variaj kontribuoj. Verschiedene Beiträge. Red. Karl Beckmann, Grete Bräunlich, Leopold Grimme. Eld. Aŭstria Esperanto-Instituto Wien 1984. 163 p.

La libreto entenas 38 tre diverstemajn kaj diversnivelajn kontribuojn kiujn oni eventuale povus ordigi sub la temon „Faktoj kaj konsideroj pri la lingva problemo kaj Esperanto". La redaktintoj elektis esperantlingvajn artikoletojn, studojn, rezoluciojn kaj aliajn materialojn el diversaj Esperanto-revuoj kaj tradukis ilin germanon. Al la enhave tre malmultaj altnivelaj materialoj nepre apartenas tiu de Arthur Bauer (de la utopio al la realeco). La celo de la redaktintoj estas tre bonvola, nome doni „informon al interesitaj amatoroj sur limigita loko pri la multfaceta agado de la esperantistoj ĉie sur la tero". (p. 6). Sed — ĉu la libro tion kapablas plenumi? Mi tre dubas. Kiel la redaktintoj skribas mem la volumo entenas „pli vere hazardan kolekton de artikoloj, eltliraĵoj, prelegoj kaj raportoj" (p. 6). Do mankas klara informstrategio. Kaj kial dulingva (Esperanto kaj germana)? La Esperanto-tekstoj estas konataj al la iom kleraj esperantistoj. Por vere serioze interesigendaj germanlingvuloj la enhava nivelo estas tro malalta. Mankas iu ajn bibliografio aŭ indeksoj. Do ne klara estas la celgrupo, por kiu la materialo estas dediĉita.

La libreto estas plua pruvo, ke bonintencaj celoj ne sufiĉas por produkti seriozan informilon por nacilingvanoj. Konkludo inter alie: Nepre oni rediskutigu serioze kaj amplekse bazajn principojn de efika informado pri Esperanto. D. Blanke

En Inĝeniera Altlernejo

Antaŭ 30 docentoj, lektoroj kaj studentoj de la Inĝeniera Altlernejo en Wismar la 19an de decembro 1984 prelegis d-ro Detlev Blanke pri la temo „Internacia komunikado per planlingvo".

Szilágyi, Ferenc: La vivo de Sándor Körösi Csoma. Budapest 1984, Hungara Esperanto Asocio, ISBN 9635711395, 151 p.
Kavalov, Jantaj: La rodopa falko. Sofio, Bulgara Esperantista Asocio, 1984, 47 p.

Estas bone konata vero, ke Esperanto peras al ni konojn pri la historio, pri famaj personoj aŭ pri famaj verkoj de aliaj popoloj. Multaj interesaĵoj el aliaj landoj ne atingas nin, ĉar ni ne regas la respektivajn lingvojn. Pro tio oni rajte nomas Esperanton pontlingvon inter la kulturoj de diversaj nacioj (kompreneble nur por tiuj, kiuj regas ĝin). Tiaj pensoj venis al mi, kiam mi legis du novajn libretojn, eldonitajn de la hungara resp. bulgara Esperanto-asocioj. La unua libreto estas „La vivo de Sándor Körösi Csoma" de Ferenc Szilágyi. Tio estas la biografio de hungara lingvoscienculo, kiu naskiĝis antaŭ 200 jaroj en la transdanubia urbeto Körös. Sándor Csoma (Aleksandro Ĉoma) jam kiel infano interesiĝis pri la deveno de la hungara lingvo kaj decidis serĉi ties fontojn en Azio. Dum sia lerneja tempo li vivis kvazaŭ sparte kaj ŝparis ĉiun moneron por la planita vojaĝo. En la jaro 1819 li forlasis Hungarion . . . kaj neniam revenis. Tra Bukareŝto, Aleksandrio, Bagdado, Teherano, Buĥara, Kabulo, Delhio, Lahoro kaj aliaj urboj kaj landoj li vojaĝis dum tri jaroj — pleje piede! — al la hinda-tibeta limo (Tibeton tiam oni ne rajtis surpaŝi). Dum sia dudekjara restado proksime de Tibeto li ja ne trovis fontojn de la hungara lingvo, sed li studis helpe de lamao la tibetan lingvon kaj literaturon, kaj pli malfrue li eldonis unuan sciencan gramatikon de la tibeta lingvo kaj ampleksan angla-tibetan vortaron. Li laboris tiom ĝisfunde, ke ambaŭ verkoj ĝis hodiaŭ restis neatingeblaj! Cetere, kaŭze de monproblemoj li vivis kvazaŭ monaĥo. La vivo de Sándor Csoma pruvas, ke homo kapablas atingi eksterordinaran — eĉ sub malfavoraj kondiĉoj —, kiam li oferas sian tutan vivon al la memstarigita celo. Csoma certe estis elstara scienculo. La libreto pri li nepre estas leginda.

Tute alia elstara homo estas la heroo de la bulgara libreto „La Rodopa falko" de Jantaj Kavalov. Ankaŭ ĝi estas biografio, sed en rakonta maniero. La „Rodopa falko" estis la bulgaro Diĉo Petrov. Li naskiĝis en 1919 en la vilaĝeto Progled (Rodopa montaro). Sekve de sia inteligenteco kaj diligenteco li sukcesis fariĝi instruisto. En la jaro 1940 la progresema viro decidis fariĝi oficiro, ĉar — kiel diris la patro — „la atmosfero jam komencas odori je pulvo, tial prefere esti oficiro ol ordinaro soldato". En somero 1942 li estis enoficigita estro de komandejo ĉe la landlimo. Poste li starigis kontaktojn kun la partizanoj, kiuj agis en tiu regiono. Li decidis aliĝi al la partizanoj kune kun ĉiuj soldatoj de sia taĉmento. Per sia prudenteco kaj konvinkoforto li sukcesis unuigi la taĉmenton kun la partizanoj. Ili kunportis ĉiujn armilojn kaj ekipaĵojn. Tio estis tre grava por la fatalo kontraŭ la germanaj okupadaj trupoj. Tiamaniere li fariĝis, dudek kvarjara, la estro de la unua bulgara liberiga bataliono kaj komandanto de la Unua Ŝturma bataliono de la (bulgara) Popola armeo dum la Dua Mondmilito.

Bedaŭrinde tiu-ĉi aminda juna patrioto ne transvivis la finon de la milito. Malamika kuglo tro frue finis lian vivon. Li oferis ĝin por la liberigo de sia patrolando.
La rakonto de J. Kavalov postdesegnas bone kaj per impresaj vortoj la vivovojon de tiu-ĉi fidela filo de la bulgara popolo.
Jen du malgrandaj, sed legindaj libretoj!
La libro de Szilágyi estas mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9

Manfred Arnold

Kristiano Morgenŝterno. Pendumilaj lidoj. El la germana lingvo tre libere kaj nur proksimume esperantigitaj de Rikardo Ŝulco ((Richard Schulz). Bleicher-Eldonejo, Gerlingen-Stuttgart 1980, 108 p., 117 x 197

Kvankam mi aliloke esprimis fortajn dubojn pri la traduka kapablo de Rikardo Ŝulco (rilate al Katarina Blum de Böll) mi devas konfesi, ke la skurilaj „Pendumilaj lidoj" de Morgenŝtern estas tre sprite kaj lerte tradukitaj, kvankam tre libere. Nu — Morgenstern ne eblas traduki ne libere alilingven. Jen **„La du azenoj":**

Azeno trista foje diris
al la edzino, kiu miris:
„Mi estas stulta, stulta ci.
Ni mortu tuj en harmoni'!"
Ĉu ili tion nun bedaŭris?
Ilia vivo gaje daŭris.
Se vi ne amas rimon riĉan,
akceptu jenan pli feliĉan:
La diro estis nur fiktiva.
Ilia vivo daŭris viva.

Kaj la germana originalo: Die beiden Esel:

Ein finstrer Esel sprach einmal
zu seinem ehlichen Gemahl:
„Ich bin so dumm, du bist so dumm,
wir wollen sterben gehen, kumm!"
Doch wie es kommt so öfter eben:
Die beiden blieben fröhlich leben.

Ke Ŝulco kreive novkreas en la spirito de Morgenstern bele montras la poemeto **„La luno":**

Ne estas luna ŝanĝ' kaprico.
Ĝi ŝanĝas nome pro ofico.
Kaj dilatante kaj cedante,
prezenti sin laŭ-Esperante.
Formante D-on kaj C-on formante,
kaj tiel ĉiun tuj helpante.
Farante tion, la trabanto
deklaras sin por Esperanto.

Kaj jen la **germana originalo: Der Mond:**

Als Gott den lieben Mond erschuf,
gab er ihm folgenden Beruf:
Beim Zu- sowohl wie beim Abnehmen
sich deutschen Lesern zu bequemen,
ein A formierend und ein Z —
daß keiner groß zu denken hätt.
Befolgend dies, ward der Trabant
ein völliger neuer Gegenstand.

Vere sprite farita novkrea traduko. Bedaŭrinde iom makulas la manio de Ŝulco kripligi proprajn nomojn. Verŝajne „Kristiano Morgenŝterno" — se ankoraŭ vivanta — pri tiu kripligo skribus poemeton.
Entute tre bela libreto.

Detlev Blanke

Verko longe atendita ofte estas altkvalita
MARJORIE BOULTON:
FAKTOJ KAJ FANTAZIOJ
PROGRESIGA LEGOLIBRO. UEA.
ROTTERDAM 1984 (431 p.)

Post la fino de Esperantokurso la lerninto disponas pri baza vorttrezoro, li konas la plej ĉefajn gramatikajn regulojn. Tiu scio sufiĉas por komenci korespondadon kaj eventuale eĉ por partopreni internaciajn aranĝojn. La danĝero resti „ĉiama komencanto" estas granda. Por eskapi el ĝi necesas ne nur la volo de la esperantisto, sed ankaŭ altkvalitaj, pedagogie riĉigitaj legolibroj, de kiuj ekzistas nur malmultaj. La libro de M. B. helpas plenigi tiun spacon. La aŭtorino destinas ĝin por „progresantoj". „Kvankam ne eblas difini tiun kategorion kun zoologia precizeco", kiel M. B. diras en la antaŭklarigo, certe la supremenciitaj kursfinintoj kaj la multaj memlernantoj apartenas al ĝi. Krome elektitaj ŝercoj, enigmoj aŭ anekdotoj el la libro — eventuale kompletigitaj de instruisto per demandoj, leksikaj aŭ gramatikaj klarigoj — pliriĉigos ĉiun instruhoron.

„Faktoj kaj fantazioj" — aŭ fakto kaj fikcio — propre estas kontraŭaĵoj en la literaturo. Tamen ĝuste la diverseco de literaturaj formoj (fabelo, prifakta raporto, limeriko, versaro, raportaĵo) kreas interesan, legindan libron.

Rimarkinda estas la multnombro da temoj. La aŭtorino sin dediĉas ekzemple al medicinaj problemoj („Sango el provtuboj" pp. 34 — 35), muziko (pp. 167 — 172), juraj demandoj („Juĝaj komedioj" pp. 213 — 216, 229 — 233), la konservado de la naturo (ekz. pp. 276 — 277). Ĉiupaĝe oni sentas la riĉan vivosperton de la aŭtorino, ŝian profundan humanecon kaj deziron al paco. Tio speciale ĝustas por la rekomendoj al korespondantoj (pp. 71 — 76, 87 — 90), kiuj estas eksterordinare utilaj kaj konsiderindaj. Pro la dispartigo de kelkaj temoj en partojn la legado fariĝas pli interesa kaj varia.

En 21 el la 52 ĉapitroj M. B. prezentas fabelojn de diversaj popoloj (ekz. de eskimoj, de indiana tribo en Usono, fabeloj el Tibeto, Nepalo, Nov-Zelando). Ili ofte estas humurplenaj, sed kelkfoje ankaŭ igas la leganton pripensi aŭ kortuŝas. Antaŭ la fabeloj la aŭtorino informas pri geografiaj kaj historiaj faktoj de la koncerna lando, pri la vivmaniero de la popolo, ŝi mencias famajn personojn el la lando. Tiamaniere la leganto ne nur ĝojas pri la enhavo, sed li ankaŭ ekscias ion pri la lando mem. Krome li pligrandigas sian vorttrezoron. Tio inkluzivas vortojn pri bestoj, plantoj kaj objektoj nekonataj al eŭropanoj (ekz. skolopendro p. 221, kiraso p. 17). La aŭtorino per simplaj esprimoj detale difinas tiujn vortojn en la teksto. Krome vortaro je la fino de la libro helpas al leganto ne posedanta Plenan Ilustritan Vortaron.

M. B. enkondukas (speciale distingitajn) terminojn, kiujn P. I. V. ankoraŭ ne enhavas. Al tiuj apartenas la nomoj por diversaj saŭroj (ekz. pteranodonto p. 321, triceratopso p. 322). En tiu rilato ĉi tiu libro superas aliajn noveldonitajn verkojn de U.E.A. (komparu: Endre Dudich „Ĉu vi konas la teron?" 1983, p. 100).

En formo de versaretoj la aŭtorino traktas gramatikaĵojn kelkfoje kaŭzantaj problemojn por lernantoj (ekz. „Versareto — pri Akuzativo" p. 21, „Versareto — pri -ind kaj -end" p. 202, „Versareto — pri da, de kaj el" p. 107). Kiel la multnombraj komike efikantaj lingvaj maltrafoj el gazetoj aŭ montrofenestroj ili atentigas la leganton pri korekta uzado de la lingvo.

La multnombro da novaj proverboj, la vortludoj, enigmoj, ŝercoj kaj anekdotoj surbaze de morfologiaj homonimoj montras la riĉecon de la lingvo, estas amuzaj por la leganto.

La tema kadro de la libro — faktoj kaj fantazioj — fermiĝas kaj samtempe atingas sian kulminon en ĉapitro 46 („Faktoj iĝas fantazioj, fantazioj iĝas faktoj") per raporto pri la romanheroo detektivo Sherlock Holmes, kiun multaj homoj opiniis reala persono, kaj pro tio letere petis lin solvi malfacilajn problemojn.

En la ĉipitro 51 M. B. okupiĝas pri stilo. Ŝi ilustre prezentas unu situacion priskribitan de diversaj personoj (i. a. policano, kuracisto, jurnalisto) kaj tiel montras, ke ekzistas diversaj stiloj, kiuj estas uzataj depende de la „temo", „uzanto" kaj „ricevanto".

„Legu, parolu, skribu, kontrolu — kaj servu!" — tio estas laŭ M. B. la rimedoj por daŭrigi la lernandon de Esperanto. Ŝi nomas 50 originalajn aŭtorojn kaj elstarajn tradukintojn (inter kiuj ŝia propra nomo cetere ne manku!), kies verkojn ŝi rekomendas, kaj substrekas la valoron de korespondado.

„Faktoj kaj Fantazioj" de M. B. estas altnivela legolibro, aparte utila por progresantoj. La aŭtorino uzas pedagogie riĉigitan stilon, kiu inkluzivas la dialogon kun la leganto. La enhavo estas interesa kaj varia kaj ebligas amuzadon kaj lernadon samtempe. Akcentinda estas la leksika riĉeco de la libro, kiu kaŭzas pligrandiĝon de la vorttrezoro ĉe la leganto. En la mano de instruisto kelkaj versaretoj pri gramatikaĵoj kaj anekdotoj el la libro uzeblas jam dum elementaj kursoj. En la antaŭklarigo M. B. pardonpetas pro la longa tempo, kiun ŝi bezonis por finskribi tiun libron. Kiel respondo oni deziras gratuli al la aŭtorino pro tiu bona legolibro aldonante ankoraŭ unu proverbon al ŝiaj 169 (!): Verko longe atendita ofte estas altkvalita!

Sabine Fiedler

Das Sowjetische Ehrenmal

Täglich kommen Berliner und viele Gäste der Hauptstadt zum Sowjetischen Ehrenmal im Treptower Park. In tiefer Ehrfurcht vor den im Kampf um die Befreiung Berlins gefallenen sowjetischen Helden betreten sie die Gedenkstätte. Wuchtig ragt die Figur des Sowjetsoldaten, ein Kind schützend umfassend, in den Himmel, ein Symbol des Humanismus und des Friedens, ein Symbol der Sicherheit, der Hilfe und des gemeinsamen Kampfes für das Wohl der Menschen.

Der Besucher betritt den Ehrenhain in Berlin-Treptow durch steinerne, von Edeltannen umgebene Portale. Zwischen dichten Baumreihen verlaufen die Zugangsalleen in stumpfem Winkel zur Hauptachse der Anlage. Genau in ihrem Schnittpunkt befindet sich die aus einem Granitblock gemeißelte Statue der „Mutter Heimat". Mit geneigtem Haupt trauert eine russische Frauengestalt um ihre gefallenen Söhne.

Über eine breite Promenade hinweg richtet sich der Blick nach Südosten; dort erscheint, eingefaßt von gesenkten Fahnen das Hauptmonument mit der krönenden Figur des Soldaten, der ein Kind auf dem Arm trägt. An der Schmalseite sind Bronzeskulpturen kniehender Rotarmisten postiert. Sie haben den Stahlhelm abgenommen, das Sturmgewehr ruht bei Fuß.

Stufen führen hinab zum zentralen Teil des Ehrenmals. Den uralten Heldengräbern der Don-Ebene nachgestaltet ist der Kurgan, ein Ehrenhügel, der die Gebeine von mehreren hundert Gefallenen birgt. Darüber erhebt sich — optischer und gedanklicher Höhepunkt des Ehrenmals — das zylindrische Mausoleum mit der riesenhaften Figur des Soldaten, der ein Kind beschützt. Unter dem gesenkten Schwert sind Teile des zerbrochenen Hakenkreuzes zu erkennen. Der Besucher steigt die Freitreppe zum Kuppelsaal hinauf und steht vor einem großflächigen Mosaikbild des Kunstmalers Gorpenko; es zeigt Bewohner der fünfzehn Unionsrepubliken, die ihrer Toten gedenken. Von der Decke strahlt der in Kristall nachgebildete Siegesorden, auf einem Säulenstumpf aus schwarzem Stein ruht das Ehrenbuch mit den Namen der hier bestatteten Soldaten.

Das in aller Welt bekannte Standbild des Sowjetsoldaten, der mit einem Schwert das Symbol der faschistischen Gewaltherrschaft zerschlägt und mit einem geretteten deutschen Kind auf dem Arm in die Zukunft blickt, bringt das feste Klassenbündnis zwischen der Arbeiterklasse der DDR und der UdSSR und die unerschütterliche Freundschaft zwischen den Völkern beider Länder zum Ausdruck.

(Vgl. die Bedingungen für den Übersetzungswettbewerb „der esperantist" 1/1985, S. 11)

Radio Polonia en Esperanto (Novembro 1984 — Majo 1985)

La horoj kaj ondolongoj

5.30 — 6.00	41,27; 48,90; 50,04; 200 m (7270, 6135, 5995, 1503 kHz)
11.00 — 11.25	31,50; 41,99 m (9525, 7145 kHz)
15.30 — 15.55	31,01; 41,18 m (9675, 7285 kHz)
16.30 — 16.55	41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
19.30 — 20.00	41,18; 49,22 m (7285, 6095 kHz)
21.30 — 21.55	41.18; 49,22; 50,04; 200 m (7285, 6095, 5995, 1503 kHz)

Atentu en GDR:

1. La horoj estas indikitaj laŭ la universala tempo (GMT), al kiu — en la landoj de la mezeŭropa tempo — vintre oni aldonas unu horon, somere — du horojn.
2. Se vi bezonas stokon da program-informiloj pri niaj E-elsendoj por via E-klubo, E-kurso, ktp., tuj skribu al ni. La program-informilojn ni sendas senpage. Nia adreso:

RADIO POLONIA, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box-46, Pollando.

Atentu:
Plene bone vi kaptas la disaŭdigojn 5,30—6,00 kaj 21,30 — 21,55 ĉe 200 m, 11,00 — 11,25 ĉe 41,99 m.

Kontrakto inter Leipzig kaj Kievo

Nia aviadilo surteriĝis. La vespera Kievo, la ĉeturbo de Ukrainio, nin akceptis malvarmvetere. Ni — tio estis delegacio de Distrikta Estraro de Kulturligo de GDR Leipzig. En la 25kapa grupo ankaŭ troviĝis du esperantistoj, nome Rolf Beau kaj la aŭtoro de ĉi tiuj linioj.

Eble estas konate, ke Kievo kaj Leipzig interligas amikajn rubandojn — ambaŭ urboj ĝemelas.

Nun nia delegacio volis profundigi la jam konstantajn kontaktojn per personaj interparoladoj. En nia pakaĵo kuŝis jam preparitaj kontraktoj, kiujn ni volis pritrakti estraronivele kun niaj kiev-aj partneroj. Letere ni antaŭe anoncis nian alvenon al la loka kiev-a Esperanto-klubo „Ora Pordego". La kiev-aj geamikoj nin invitis partopreni al Zamenhofsolenaĵo okaze de 125-a datreveno de naskiĝo de la iniciatoro de Lingvo Internacia. „Eskorto" de la klubo „Ora Pordego" nin akompanis de nia hotelo al la klubejo de la kiev-aj gesamlingvanoj. Ili posedas propran klubejon!

Akurate je la 12-a horo ni alvenis al la „Ora Pordego"-klubejo. Kaj la ĉambrego estis plena — malgraŭ estis dimanĉo! Oni nin salutis kiel tutmalnovajn amikojn. Okulfrape la multaj junaj vizaĝoj inter niaj gastigantoj. Ankaŭ la fakto, ke ni neniam aŭdis krokodilantojn! Eĉ la ĉeestantaj infanoj jam iomete scipovis Esperanton. Mi en mia „esperantista vivo" neniam antaŭe devis tiom multe paroli nian Lingvon Internacian, ĉar niaj kiev-aj geamikoj petis pri respondo de multaj demandoj.

La dimanĉa daŭris ĝis en la vesperajn horojn:: komuna kantado, bekaĵa konkurso kun bongustaj rezultoj, lumbildprelegoj, filmprezentado ktp.

Alietage ni transiris al la oficiala laboro. En la domo de „Societo por Internacia Amikeco de Ukraino" (kvazaŭ tegmenta organizaĵo de kiev-aj esperantistoj) ni kunvenis kun gvidantoj de la ukraina filio de ASE, de la Klubo „Ora Pordego" kaj vicĉefo de la kultura sekcio de jam antaŭe nomita societo. En amika rondo ni kune pritraktis niajn kunportitajn malnet-kontraktojn. Ili tutplene estis akceptitaj de ambaŭ flankoj.

Kiam kvin tagoj pli poste nia aviadilo startis ĉielen, en nia pakaĵo estis multe da gastdonacoj kaj en niaj kapoj la scio, ke en la fora Kievo ni havas geamikojn, kiuj samopinias kun ni: La subskriboj sur niaj kontraktoj nur estas unu flanko — la plej grava estas nun la realigado de la elstarigitaj taskoj!

Joachim Schulze

Kontrakto

pri kunlaboro inter la Kiev-a Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco „Ora Pordego" kaj la Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR

La Estraro de Kiev-a Esperanto-Klubo de Internacia Amikeco „Ora Pordego" kaj Distrikta Estraro Leipzig de Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR (en la sekva teksto estas nomataj Estraroj)

samopinias, ke la ĉefceloj de ambaŭ Estraroj konguras kaj ke necesas ankoraŭ pli efike utiligi la Lingvon Internacian Esperanto por la idealoj de socialismo kaj internaciismo en la mondo,

decidas, konsiderante la neceson realigi la supre formulitajn ĉefideojn, subskribi kontrakton pri kunlaboro kaj realigi jenajn ĉeftaskojn:

§ 1. Regulaj interkonsultiĝoj inter la Estraroj por interŝanĝi spertojn pri la praktika apliko de la Lingvo Internacia en la servo de la socio.

§ 2. Akcelado de aktivecoj servantaj al:
— la organizo de kulturaj aranĝoj, diversspecaj renkontiĝoj kaj ekspozicioj;
— interŝanĝo de kulturaj kaj fakaj prelegoj.

§ 3. Ambaŭ Estraroj
— decidas apartan atenton al la junulara agado;
— interŝanĝos materialojn kaj informojn, servantajn al la realigo de ĉi tiu kontrakto.

§ 4. Ambaŭ Estraroj decidas, ke ladetaloj pri la kunlaboro, la unuopaj taskoj kaj formoj estas difinitaj en protokoloj dujare interkonsentataj. La protokoloj estos aparte precizigantaj la unuopajn entreprenojn, difinante iliajn datojn, la financan flankon kaj la nomojn de la personoj, respondecaj pri ili. La protokolojn oni ellaboras obeante la jurajn preskribojn, validajn en la landoj.

§ 5. Ambaŭ Estraroj interkonsentas, ke ĉiuj formoj de la kunlaboro devas sekvi la principon de la egaleco en la financaj procedoj.

§ 6. La kontrakton oni povas ŝanĝi aŭ kompletigi laŭ la deziro de unu el la kontraktantoj. Tio samvalidas por la protokoloj kaj interkonsentoj.

§ 7. La versioj de ĉi tiu kontrakto en la rusa, germana kaj esperanta lingvoj estas same aŭtentikaj.

§ 8. La kontrakto estos konigita en konvena formo al la membroj de la kolektivoj, kiujn gvidas la Estraroj.

Por la Kieva Esperanto-Klubo
de Internacia Amikeco
„Ora Pordego"
Michail Lineckij
(vicprezidanto)

Por la Distrikta Estraro Leipzig
de Esperanto-Asocio en
Kulturligo de GDR
Rolf Beau
(prezidanto)

Kievo/Leipzig, en decembro 1984

„Saksa Kuriero“

Ekzistas la ebleco aboni (mal)novan informilon, kiun aperigos GDREA en distrikto Leipzig. Temas pri la revueto SAKSA KURIERO (SK).

Ekde komenco de 1985 ĉi tiu revueto aperos, transsaltonte la distriktajn limojn, por la tuta GDR-esperantistaro! Ĝi devenos de nuntempa „Esperanto-Informilo“, kiu ŝanĝis sian titolon.

Jen detalaj faktoj:

1-e: La nuntempa amplekso de la dumonata revueto estos 8 paĝoj. Ĝi estos moderne aranĝita, bone kompostita pere de fotokompostado, bonaspekte presita kaj facile legebla.

2-e: „SK“ entenos pri-, per- kaj por-esperantajn problemojn el la nacia kaj internacia terenoj.

3-e: „SK“ ne konkuros kontraŭ „der esperantist“, tute male! Ambaŭ redakcioj estonte firme kunlaboros kaj kunordigos siajn publikaĵojn. Tial „SK“ ne estos superflua eldonaĵo, sed eĉ kroma bezonaĵo por ĉiu esperantisto el inter ni.

4-e: „SK“ aperos tutplene en Esperanto. Tial ĝi ne estos privarbada rimedo, sed eldonaĵo ene de nia tuta esperantistaro.

Kiamaniere aboni la revueton „Saksa Kuriero“?

„SK“ aperos sesfoje pojare kaj kostas 3 markojn (por tutjara abono). Tiun sumon enpagu al jenaj adreso kaj

Leipzig-a **poŝtĉeka konto:**

Bezirksleitung
des Kulturbundes der DDR,
7010 Leipzig,
Käthe-Kollwitz-Straße 115,
konto-numero 7499–57–9811.
Nepre aldonu kodon 100–2870!

Kion „SK“ entenos?

Multegaĵojn! Interalie ni aprobis kiel konstantajn rubrikojn:

— Novaĵoj el Esperantio
— Inter ni dirite
— El la historio de Esperanto
— Ni recenzas
— Fake
— Aranĝoj (naciaj kaj internaciaj)
— Koresponddeziroj

kaj . . . kaj . . . kaj . . .! Ni ne jam antaŭe volas malkaŝi ĉiujn erojn!

Kiu redaktos „SK-on“?

Ĉiu el inter ni povos esti kun-redaktoro! Ĉiu povos kontribui per-artikole! Nia redakta teamo konsistas el tripersona komitato, i. a. d-ro Erich-Dieter Krause prigardos la lingvon! Tiom malmulte pri nia (mal)nova revueto. Niaj klopodoj plivastigi la eblecojn esperantlingve publici ne estu vanaj! Subtenu nin, ĉar ni ne volas skribi por malmultaj legantoj, sed ni volas per nia honorofica laboro starigi tribunon por ĉiuj GDREA-membroj! Ekkaptu vi la okazon — ni pretas!

Distrikta Estraro de GDREA
en Kulturligo de GDR
p. k. 713

Harry, Ralph: Vortoj kun flugiloj. Citajoj el la tuta mondo. Canberra (Aŭstralia Esperanto-Asocio) 1984, 64 p. multobligita, 145 x 210

Jen ege bezona kolekto de citaĵoj el famaj verkoj. Tre ofte oni povas per tiuj „flugilhavaj vortoj“ (germ. geflügelte Worte) spici prelegon aŭ eseon, sed ne ĉiam havas taŭgan ĉe-mane aŭ, se jes, eble ne scias la precizan fonton.

Ralph Harry kolektis entute 560 tiajn esprimojn kaj citaĵojn eluzante konatajn originalliteraturajn tekstojn en Esperanto kaj tradukojn de mondliteraturaj verkoj, literaturaj kaj filozofiaj. Tipa „flugila vorto“, por doni ekzemplon, estas la cito el „Faŭsto“ de Goethe sub la temvorto „saĝo“: „Jen staras nun mi malsaĝul', kaj mia saĝo estas nul'“.

Ĉe ĉiu citajo ni trovas la aŭtoron kun vivodatoj kaj la precizan fonton. Bedaŭrinde fojfoje Harry kripligas la propran nomon. (ĉu li lernis de Rikardo Ŝulco?) El Goethe ekzemple fariĝis Goeto, kvankam pli laŭprononce estas proksimume Gete. Aliflanke li lasis Byron kaj ne skribis ‚Bajren'. Similaj malkonsekvencaĵoj ĉe propraj nomoj abundas. La indekso de la temvortoj registras pli ol 450. Entute tre bonvena kompilaĵo. Interesiĝantoj por helpi kompiladon de dua eldono kontaktu la aŭtoron: Ralph L. Harry, AC, CBE, 8 Tennyson Cres. Forrest A.C.T. 2603, Aŭstralio.

Detlev Blanke

Radiodisaŭdigo pri Zamenhof

La 19an de decembro 1984 en la radio-stacio Berliner Rundfunk (magazino BIT) estis disaŭdigita intervjuo kun Fritz Wollenberg pri L. L. Zamenhof.

Enciklopedio de MEM

Adreso: Bulgario, 1303 — Sofio, bulv. Ĥristo Botev 97 (por Enciklopedio de MEM)

La verko de Nikola Aleksiev „Pioniroj kaj veteranoj de MEM", eldonita en Sofio, 1983, de BEA kaj de Bulgara MEM-Komitato ampleksas la biografiojn de dek unu gvidintoj kaj aktivuloj de MEM el ses landoj. Tiu verko estas dissendita en limigita kvanto al ĉiuj landaj MEM-komitatoj kaj al la apartaj MEM-perantoj en ĉiuj landoj kaj al la konataj pacaktivuloj. La pacamikoj, kiuj kapablas kaj deziras kontribui kompletigon al biografioj de Anton Balagué, Semjon Podkaminer, Eŭgeno Bokarev, Tomaŝ Balda, Rudi Graetz, Gurgeno Sevak, Ludoviko Marton, Otto Bässler, Petro Poliŝcuk, Nguen Van Kinh kaj Konstanteno Gusev estas petataj respondi ĝis la fino de 1985.

La favora resono al la recenzo de la menciita libro en „Paco", n-ro 4/1984 instigis al plua kontribuo. Estas verkitaj biografioj de elstaraj MEM-anoj: Ĥristo Gorov (Ĥrima), Ivan Keremidĉiev — Esperov, Dimitro Zlatarski (Miti), Asen Grigorov (Ljubin), Violin Oljanov (Zefiro), Atanas Lakov — ĉiuj el Bulgario. Ni atendas ricevi ĝis la fino de 1985 notojn pri biografioj de prezidanto, sekretario kaj membroj de landaj MEM-komitatoj, de landaj perantoj de MEM kaj ties kunlaborantoj.

Krom tio ni bezonos artikolojn pri MEM laŭlande, pri internaciaj kaj landaj MEM-organoj, pri Konferencoj (Unua, Dua . . .) de MEM, pri libroj kaj broŝuroj de MEM, pri lokaj, landaj kaj internaciaj porpacaj aranĝoj kiel tiuj en Pardubice, ČSSR; en pluraj urboj de Bulgario; aŭ tiaj dum neŭtralaj E-kongresoj.

Ni bezonos ankaŭ artikolojn pri apartaj periodoj aŭ okazaĵoj el la agado de MEM. La aŭtoroj de artikoloj en la broŝuro „MEM 30-jaraĝa" (1983) estas petataj relabori siajn kontribuajojn (se tio estas necesa) kaj ekspedi ilin al nia adreso supre montrita. Ni atendos ankaŭ aliajn artikolojn el la historio de MEM, raportojn de A. Balagué k. a. legitaj ĉe la konferencoj de MEM.

Ĉiuj leteroj, manuskriptoj, dokumentoj, E-gazetoj kaj libroj senditaj al ni por kompilo de „Enciklopedio de MEM" estos transdonitaj al „Bulgara Esperanto-Muzeo", kie jam funkcias granda „Fako pri Mondpaca Esperantista Movado".

Ni urĝe bezonas konsilojn kun proponoj de plenumantoj.

Laŭ provizora plano la preparata verko enhavos tri mil artikolojn kaj ampleksas 600 paĝojn. Ĝi aperos en Bulgario, se ne en Hungario aŭ alilande. Ankaŭ pri tio ni atendos proponojn. La verko estos preta en manuskripto, transdonota al presejo komence de 1986. Al laboro! La Redakcio de „Enciklopedio de MEM"

(Represo kompleta aŭ konciza estas dezirata)

Krum Velkov „Vilaĝo Borovo"
trad. Asen Grigorov, eld. Hungara Esperanto-Asocio (1983)

Malgraŭ mia klopodo mi ne sukcesis ekscii ion plian pri la aŭtoro de tiu ĉi verko ol la nomon — en la leksikono de fremdlingvaj verkistoj eĉ tiu bedaŭrinde ne troveblis.

La temo estas malnova — kaj tamen samtempe ĉiam aktuala. La libro estigas jam forpasintan tempon en la spirito de la leganto. Ni troviĝas en la jaro 1923.

Disvolviĝas la tragedia sorto de bulgara montara vilaĝo kaj ties loĝantoj, kiuj estas ŝiritaj en la kirliĝon de revoluciaj eventoj. Intermiksiĝas ravigaj priskriboj de la naturo kaj karakterizoj de diverstipaj homoj. Maturiĝanta revolucia situacio kvazaŭ glavo de Damoklo pendas super la kapo de la vilaĝa tirano Nako, kiu unuigas ĉiujn potencojn en siaj manoj kaj per ĉiuspecaj metodoj ekspluatadas la vilaĝanaron, Marin, nevo de Nako, politika konscia laboristo kaj muntisto de la nova vaporsegilo, fariĝas agitatoro kaj organizas sekretajn kunvenojn. Li eĉ kapablas reaktivigi la maljunan instruiston de la vilaĝo, kiu en la juneco mem konatiĝas kun la Loka Revolucia Soveto, kiu transprenas la potencon. Sed post mallonga regado de la novaj fortoj kontraŭ-revolucia soldataro disbatas la esperdonan situacion, pafmortigas la gvidantojn kaj reinstalas la ekspluatordon de Nako. Tiel la sorto de Borovo denove sufokiĝas sub la kruela praktiko de subpremo. Tamen signalo estis metita, kaj pli multaj homoj nun konscias pri la propra forto.

Des pli interesaj estas la figuroj de la romano, ĉar vivoplena lirika bildo de grandaj kaj malgrandaj zorgoj, amo kaj doloro tiel alparolas la leganton, ke li ne povas sin deteni de la etoso. Tamen kelkloke la stilo ŝajnis al mi iom tro peza, kaj ne komprenebla estas la neceso de tiel ampleksa glosaro. Anstataŭ tiu mi dezirintus postparolon kun indikoj pri la aŭtoro kaj rilatoj al la historio. Mi vere sentis la mankon de io tia, laŭ mi ĝi povus rondigi la impreson pri la libro.

(Mendebla ĉe Haus der Ungarischen Kultur, 1020 — Berlin, Karl-Liebknecht-Straße 9)

Ralf Janke

Al Wörlitz

La esperantistaro de la subdistrikto Gräfenhainichen elkore invitas vin al 2a regiona esperantista renkontiĝo en la Pejzaĝa Parko de Wörlitz. Ĝi okazos la 31an de aŭgusto 1985.

Informojn ĉe: Esperanto-Verband im Kulturbund der DDR, Kreisvorstand, 4450 Gräfenhainichen, Rosa-Luxemburg-Straße)

Internaciaj aranĝoj 1985 en Hungario
Se vi volas viziti Esperantistan aranĝon en Hungario, petu senpagan informbroŝuron ĉe Hungara Esperanto-Asocio, H-1368 Budapest, Pf. 193, aŭ ĉe Esperanto-Verband (GDREA), 1080 Berlin, Charlottenstraße 60.

KORESPONDDEZIROJ

31 6 35

Ni publikigos nur tajpitajn koresponddezirojn!

GDR

Komencanto, 20j., dez. kor. prec. kun japanaj k. nederlandadaj geesperantistoj pri kaktoj k aliaj temoj: Christian Kahle, **4300 Quedlinburg,** Wegelebener Weg 18
Oficistino, 45j., dez. kor. pri sporto, muziko, vojaĝoj, kol. bk, pm:
Edeltraut Behrens, **3040 Magdeburg,** Jakobstraße 24.
Komencantoj dez. kor.:

— Instruistino, 45j.: Monika Anger, **9438 Johanngeorgenstadt,** Ernst-Thälmann-Str. 2
— Kuracistino, 36j.: Dr. Christl Berger, **9438 Johanngeorgenstadt,** Jugelstr. 8
— Laboristo, 40j.: **9430 Schwarzenberg,** Otto-Grotewohl-Str. 11, Reinhard Bünger
— Sportinstruisto (anstataŭanto de lernejestro), 46j.: Detlev Motz, **9437 Grünhain,** Scheinstr. 9, pf. 133
— Aŭtomobilisto, 39j.: Alphard Beer, **9430 Schwarzenberg,** Hermann-Matern-Str. 13
— Lernantino en malsanulejo, 18j.: Viola Schubert, **9430 Schwarzenberg,** Otto-Grotewohl-Straße 21
— Laboristo, 25j.: Jürgen Schmidt, **9400 Aue,** Robert-Koch-Str. 34
— Flegistino, 47j.: Erika Pechstein, **9436 Erlabrunn,** Am Waldeck 15
— Claudia Lenhard, **9438 Johanngeorgenstadt,** Ernst-Thälmann-Str. 36, 15j.
— Kerstin Wagner, **9438 Johanngeorgenstadt,** Alexander-Puschkin-Str. 11, 14j.
— Andrea Ledermann, **9438 Johanngeorgenstadt,** Karl-Marx-Ring 11, 14j.
— Monika Jung, **9438 Johanngeorgenstadt,** Maxim-Gorki-Str. 6, 13j.
— Kathrein Prokain, **9438 Johanngeorgenstadt,** Friedrich-Engels-Str. 26, 13j.
— Kurti Paschalles, **9438 Johanngeorgenstadt,** Rosa-Luxemburg-Str. 2, 15j.
— Kathrin Berger, **9438 Johanngeorgenstadt,** Jugelstraße 8, 14j.
— Rommy Beyer, **9438 Johanngeorgenstadt,** Karl-Marx-Ring 11, 15j.
— Jana Rabe, **9438 Johanngeorgenstadt,** Kantstraße 70, 14j.
— Kathrin Richter, **9438 Johanngeorgenstadt,** Ernst-Thälmann-Straße, 14j.

Belgio

Fabienne Valet, 1 rue de Maibelle, **5100 Jambes-Namur,** 12j. dez. kor.

Hungario

Zsuzsanna Kakas, **2659 Ersekvadkert,** Szabo Lösinc ut. 3, 12j., dez. kor. pri sporto, modo
Róbert Dósa, **2659 Ersekvadkert,** Béke ut. 4, 13j., dez. kor. kol. bk pri bestoj
Interŝanĝon de E-stampoj proponas Podani, János, **H-1055 Budapest V,** Pálffy György u. 17. V. 3. Urĝe serĉata: E-renkontoj Oschatz 1970, Wismar 1970
Lernantino, 15j., dez. kor. pri sporto: Mária Lans, **8200 Veszprem,** Martinoues tish.
Lernantino, 13j., dez. kor. kun knabo pri sporto, muziko, turismo:
Mónika Csatai, **H-5700 Gyula,** Szüret 14
Attila Krajes, **3535 Miskolc,** Kuruc u. 69. 1/2, 20j., dez. kor. kun esp. el GDR pri turismo, fotografado

Jugoslavio

Josić Snježana, Srećka Knezoviča 8, **58311 Stobreč,** Split, 14j., dez. kor., kol. pm

Kolumbio

Héctor Munoz G., CRA 48a no. 73-14, **Medellin-Colombia,** 30j., dez. kor.

Soveta Unio

Gelernantoj, 11 — 15j., dez. kor., kol. bk, insignojn, kalendaretojn, pm: Palaco de pioniroj, KID „ROMAŠKA", **310002 Ĥarkov—2,** ul. Sumskaja 37
Inĝeniero, 50j., MEM-aktivulo, dez. kor. kun pacamikoj sufiĉe regantaj Esperanton: Julio Lupickij, **310072 Ĥarkov,** str. 23.
aŭgusto 62—127

Herausgeber: Kulturbund der DDR
Redaktion: 1080 Berlin, Charlottenstr. 60
Fernruf: 2 20 29 91
Verantw. Redakteur: Dr. Detlev Blanke.
Redaktionskommission: Hans Heinel, Werner Pfennig, Rudolf Hahlbohm, Ludwig Schödl. — Veröffentlicht unter der Lizenz-Nr. 648 des Presseamtes beim Vorsitzenden des Ministerrates der DDR. —
Erscheinungsweise: 6mal im Jahr. Preis pro Einzelheft 30 Pf.
Druck: Druckerei Aue, 9400 Aue,
Artikel-Nr. (EDV) 7928 3 2 16